


1988 decembro
81-a jaro
n-ro 996 (12)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun un kaj unesko)
sidejo: nieuwe binnenweg 176 • 3015 bj rotterdam • nederlando



Junula ribelo

Hector Hodler kaj la konstruo de UEA

Vi trovos,

ke la redaktoron denove kaptis ia decembra febro, ia jarfina pasio por retrorigardoj. Ne al la pasinta jaro sed trans jardekojn la ĉi-numeraj artikolantoj ĵetas lumofaskojn, spotante jen esperantiston, jen esperantanon, jen esperantaron (por iom ĵongli per sufiksoj). Ni movadanoj trovas nin kvazaŭ spektantoj kaj rolantoj en malluma cirka tendo. Ni vidas nur parteton de la miraklaj saltoj kaj ekvilibrumoj ĉirkaŭ ni; niaj propraj prezentoj, tiel zorge preparitaj, trafas nur kelkopon da okuloj. Jen do la rolo de movada revuo, spoto en la tenebro, videbligilo ne nur de la aktualo sed de la pasinto. Temas ĉi-numere precipe pri tiu lasta, kvankam kunestas ankaŭ pluraj novaĵoj el plenŝtopita aŭgusto. Se iu akrobataĵo elvokos vian miron aŭ admiron, stimulos vian fieron kaj fantazion, inspiros vin al imitado – tiam plenumiĝos la lumigista tasko. Kaj se ne, skribu al ni: la programon ne eblas ŝanĝi, la prilumadon jes ja!

Enhavo

- 205 80 jaroj de Universala Esperanto-Asocio: La heredaĵo de Hector Hodler (Ulrich Lins)
- 206 Nürnberg: la movado centjaras! (Katrin Bosson)
- 208 Esperantologio: Lingvistoj renkontas Esperanton en Budapeŝto (V. Sadler)
- 21-a Pupteatra Internacia Festivalo: Kaptu la pupteatrajn ŝancojn (Zlatko Tišljar)
- 209 Filmo kaj fotografio: Jubilea ILEF-Festivalo (D. Simeonov)
- 210 2-a Kultura Esperanto-Festivalo: Kritiki Estas Facile... (Georgo Kamaĉo)
- Nova posteno por la prezidanto de UEA
- 211 50 jaroj de Tutmonda Junulara Esperantista Organizo: "Ke vi restu ĉiam juna" (Mark Fettes)
- 213 Paĝoj el la historio: Ambasadoro en Nipono (Osmo Buller)
- 216 Recenzoj: *Plurilinguisme et communication* red. de François Lo Jacomo (Jonathan Pool); *Socilingvistikaj aspektoj de la internacia lingvo – kun aparta konsidero pri la lingva diverseco en la mondo* de div. aŭtoroj (Probal Daŝgupto); *Ĉernobil skuis la mondon* de Esperanto-Disvastiga Studgrupo (Douglas Draper); *Sepdek-sep ŝlosiloj por la Japana Civilizacio* de Umesao Tadao k.a. (Charles Rowe)
- 219 Reagoj: Malserioza malpreparo (G. Pirlot, Lee Jung-Kee, May Bijleveld); Por Akademia komunikemo (G. R. Corrêa); Ke ne nur Radio Vatikano... (Vittoria Spina); Komitatanoj centren! (Renato Corsetti)
- 220 Foliume (pripresaĵaj raportetoj)
- Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
- 221 Fake – Loke (mallongaj novaĵoj)
- 222 Indekso 1988
- 224 Anoncetoj; Oficiala informilo

La kovrilo

Manipulisto neniam estis Hector Hodler, malgraŭ ĉi tiu populara bildkarto el Liono: "Ni grupigas nur la homojn, kiuj deziras esti grupigitaj." La sama devizo valoras plu por UEA, kies ligitecon kun la idearo de Hodler substrekas Ulrich Lins en sia duparta artikolo pri la UEA-fondinto. Kaj la juneco de Hodler memorigas krome pri Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, kvindekjariĝanta alipaĝe. TEJO kaj UEA dividas multon, inkluzive la bezonon de kritiko kaj renovigo: nepras do sendi, antaŭ la jarfino, viajn proprajn ribelajn pensojn pri la oktobra projekto de Strategia Plano al la prezidanto de UEA, prefere kopie al ni. Ankaŭ la januara numero temos parte pri tio.

esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910); establita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). Legata en 105 landoj. Voĉlegata por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 44,50; US\$ 21; GM 39; enoj 3300; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de la CO de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: + 3110 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telefakso: + 3110 436 1751.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: Neil Salvesen.

Estraro de UEA

Prezidanto (planado, esploro kaj dokumentado): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, University of Hartford, West Hartford, CT 06117-0395; tel. (203) 243-4417; telefakso: (203) 243-4070; telekso 9102505313.

Vicprezidanto (financa evoluigo): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35.

Vicprezidanto (kulturo): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tōkyō, 153, Japanio; tel. (3) 770 64 86.

Ĝenerala Sekretario (kunordigo de la funkciado de la asociaj organoj): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

Estrarano (landa, regiona, kaj faka agado): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

Estrarano (scienca kaj teknika aplikado de Esperanto): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hungario; tel. (1) 316 423; telekso 225931 muegy h.

Estrarano (eksteraj rilatoj): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Francio; tel. (1) 46 65 22 16.

Estrarano (kongresoj): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cecina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Edward Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (03) 666 62 66.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Jan Koszmaluk, 8 Villa Stendhal, F-75020 Paris, Francio; tel. (1) 43 66 63 47.

La heredaĵo de Hector Hodler

En la januara numero de tiu ĉi jaro, ni promesis "paĝabundon diversspecan kaj diverscelan" okaze de la okdekjariĝo de UEA. Espereble vi konsentas, ke ni ne tute malsukcesis en tio. Sed nenia datreveno estus kompleta sen omaĝo al la antaŭuloj, kaj apud la grandioza kontribuo al UEA de Ivo Lapenna (primita en lia februara nekrologo), du pliaj nomoj alvokas por atento. Al Edmond Privat (1889-1962)

Hector Hodler, kiu antaŭ 80 jaroj fondis Universalan Esperanto-Asocion, estas la filo de svisa pentristo kun intertempe monda famo. La patro, Ferdinand Hodler (1853-1918), devenis el malriĉa familio en vilaĝeto proksime al Bern, do la germanlingva parto de Svislando. Jam en infanaĝo Ferdinand perdis siajn gepatrojn, ambaŭ pro tuberkulozo. La orfo komence pentris pejzaĝ-bildojn por turistoj. Deksepjara, li ekloĝis en Ĝenevo, kaj lia talento iom post iom perfektigis en tiu kosmopolita medio.

Tie, en Ĝenevo, la 1-an de oktobro 1887, naskiĝis Hector. Lia patro tiutempe ankoraŭ ne estis famulo, sed – kiel formulis Edmond Privat en aprilo 1920 en nekrologo pri sia amiko – “pene baraktanta artisto, akre kritikata pro la forta originaleco de lia verko kaj malfacile batalanta por la ĉiutaga pano”. La patrino de Hector, Augustine Dupin, estis modesta kudristino.

Jen kiel Privat priskribis sian unuan renkonton kun Hector:

Kiam mi dekdujare eniris la gimnazion, mi tuj rimarkis tiun novan kamaradon, altan, malgrasan, malriĉan, kun mirindaj okuloj kaj senordaj brunaj haroj kronantaj lian belan grekan frunton. Lia neforgesebla figuro aperis sur pli ol unu pentraĵo de l' patro. Kiam ni kune elkuris el klaso je la kvara posttagmeze, Hector Hodler malgaje rapidis al la patra pentrejo sub tegmento por sidadi aŭ staradi terure senmove dum horoj kiel modelo.

Dum tiu turmento li kutimiĝis je pensado. Tiam li lernis tiun silentemon kaj trankvilecon, kiuj kaŝis sub iom nevarma eksteraĵo la plej senteman koron kaj fervoran animon.

La du forte amikiĝis. Denove laŭ Privat: “Kiam la patro ne bezonis lin, ni faris kune longajn promenadojn, diskutante kiel knabetoj pri la profundaj misteroj de l' socia vivo.” Privat senenvie notis (en 1920), ke Hector “estis la pli saĝa kaj la pli multescia” el la du. Jam kiel 12-jarulo Hector legis la tutan verkaron de Emile Zola.


Al Privat ni dankas ankaŭ priskribojn, kiuj iom klarigas la evoluon de la mondkoncepto de Hodler. Li rakontis, ke la du knaboj ofte eksidis sur la plej malantaŭaj benkoj de la publiko sur la galerio de la parlamento de Ĝenevo. Tie Hector moke imitis la solenajn paroladojn de la eminentuloj, ĝis ambaŭ devis forkuri, kiam pordisto per bastono minacis forpeli ilin. Tio eble ŝajnas pli signo de buba petolemo, sed ni disponas ankaŭ ateston, kiu montras, ke Hodler, mem deveninta el malriĉa medio, bone konsciis la gravecon de sociaj problemoj. Iun tagon Hodler kondukis Privat por rigardi batalon inter la armeo kaj strikantoj ĉe

dediĉigos la venonta jaro, laŭ iniciato de la svisaj esperantistoj. Sed de lia amiko kaj UEA-fondinto la centjariĝo jam pasis: Hector Hodler samaĝis kiel Esperanto. En Varsovio 1987 temis do ankaŭ pri lia jubileo, kaj almenaŭ unu partoprenanto memoris tion: historiisto Ulrich Lins prezentis biografian prelegon en la Internacia Kongresa Universitato. Al ĝi ni dediĉas parton de tiu ĉi kaj la posta numeroj.


unu el la pontoj de Ĝenevo. Privat forte impresiĝis pro tiu drama vidaĵo. Kiel li poste agnoskis, li lernis de Hodler la komprenon pri laboristaj bezonoj kaj pro li interesiĝis pri la kondiĉo de la malriĉaj klasoj.

Tiaj infanaĝaj epizodoj ĉiam estas volonte citataj, kiam oni priskribas la vivon de reformistoj aŭ revoluciuloj. Sed Hodler ne iris la vojon de socia ribelemo – almenaŭ ne tian, kian iris aliaj, kies sento pri maljusto estis frue vekita. Li ekiris iom alian vojon.

En februaro 1903 Privat venis en la klason kaj montris al Hodler gramatikon de Esperanto, ricevitan de la patro. “Bonan tagon,” li diris al Hector, kredante lin surprizi



La memfida redaktado de Hodler kaj Privat portis Juna esperantisto de simpla multobligajo ĝis bela ilustrita revuo.



per vortoj en nekonata lingvo. “Saluton!” tiu respondis Esperante, kun brilo en la okuloj. “Ankaŭ mi eklernas, ĉar mi trovis lernolibron inter paperaĉoj.”

Post tri semajnoj la amikoj jam flue interparolis. Ili fondis klubon kaj hektografitan gazeton, *Juna Esperantisto*, la unuan por lernejoj. La redaktejo estis sur la lernejaj benkoj, la presejo kaj bindejo sub lavitaj tukoj en la subtegmentejo de la domo de Edmond.

La aktivado ne estis limigita al la rondo de lernejoj. En 1906 Ĝenevo gastigis la 2-an UK – kaj ĝin plejparte organizis Privat kaj Hodler. (Estis tiu kongreso, en kiu Zamenhof pasie emfazis la internan ideon, metante ĝin super la praktika utilo de Esperanto.)

Tiu kongreso verŝajne decidis pri tio, ke Hodler tute dediĉu sin al Esperanto. Kiam li kaj Privat en 1907 finis la liceon, Hodler decidis ne studi en universitato, afero kiun li konsideris tro malnovmoda kaj tempoperda. La patro portempe esperis, ke la filo sekvos lin kaj fariĝos ankaŭ pentristo, sed devis rezigni. Feliĉe, la patro intertempe estis famiĝinta kaj jam riĉa – tio ebligis al la filo vivon liberan de financaj zorgoj.

Fine de 1906 Hodler aĉetis de la franco Paul Berthelot la gazeton *Esperanto*, la nunan organon de UEA. Tiu gazeto servis al li kiel tribuno por aŭdigi sian opinion pri la Esperanto-movado. Estis decidaj jaroj. La kongresoj de Bulonjo kaj Ĝenevo montris kreskantan memfidon de la esperantistoj, en la plej multaj landoj kreiĝis Esperanto-asocioj, kaj la publiko komencis kredi, ke Esperanto eble havos estontecon – sed aliflanke mankis internacia organizaĵo de la esperantistoj. Plimulto deziris ĝin (ankaŭ Zamenhof), sed ĝian efektivigon malhelpis la egoismo kaj ĵaluzo de la francaj gvidantoj. Ja estis Esperantista Centra Oficejo en Parizo, gvidata de generalo Sebert, sed ĝi estis pure privata kaj teknika sekretario, kiu neniel povis kompensi la mankon de internacia organizaĵo.

La krizo en la Esperanto-movado, kiu esprimiĝis en la tiel nomata Ido-skismo, do la brua ĉesigo de la diskutoj pri reformoj en la lingvo, servis al Hodler kiel okazo por akcenti la urĝan neceson de organizo. Li atentigis, ke la Esperanto-movado tute ne havas aŭtoritatan reprezentanton (ĉar ja Zamenhof rezignis pri sia rajto de aŭtoreco). Li pledis por forigi tiun “malordegon” per la kreo de delegitaro, konsistanta el la reprezentantoj de la diversaj organizaĵoj esperantistaj.

Tiun proponon publikigis Hodler en sia revuo fine de 1907. Ĝi ne trovis reeĥon, parte pro tio, ke ĝi estis laŭdita ĝuste de Louis de Beaufront – de tiu homo, kiun la esperantistoj konsideris la vera kulpulo de la Ido-skismo. Sed meze de la ŝtormo de indigno Hodler pluevoluigis sian projekton de organizaĵo. Li forlasis la ideon de oficiala organizaĵo de ĉiuj esperantistoj, ne volante impliki sin en la rivalecon de la establita gvidantoj, kaj anstataŭe limigis sin al preparoj por la fondo de asocio de tiuj esperantistoj, kiuj deziris forlasi teoriaĵojn kaj firme ekagi por uzado de Esperanto en la praktiko. Transpreninte la ideon de la du francoj Théophile Rousseau kaj Alphonse Carles pri t.n. esperantistaj konsuloj, kiuj prizorgu praktikajn servojn kaj tiamaniere demonstreu la tujan utilon de Esperanto, Hodler celis starigi asocion, “kies celo estas la plifaciligo de la ĉiuspecaj rilatoj inter diverslingvanoj kaj la kreo de fortika ligilo de solidareco inter ĝiaj anoj.” Li pensis pri ne nepre vasta, sed demokrata asocio, kiu estu simpla, servopreta kaj malmultekosta.

Kaj tiu asocio estis UEA, fondita la 28-an de aprilo 1908, konsistanta nur el individuaj membroj, do ne bazita sur naciaj asocioj – kvazaŭ rezulto de junula ribelo kontraŭ la oficialaj gvidantoj de la Esperanto-movado. Kiel Hodler pli malfrue notis, UEA ĉe kelkaj gvidantoj “vekis nur tre moderan entuziasmon”. Ili opiniis la novan organizaĵon nevivipova. Plue, Sebert pretendis, ke – tiel longe, kiel ne kreiĝis ĝenerala organizaĵo de la esperantistoj – lia Centra Oficejo estas la pli-malpli oficiala gvida instanco de la movado – kaj lin subtenis Zamenhof. La aŭtoro de Esperanto evidente komence apartenis al tiuj, kiuj skeptike rigardis la iniciaton de Hector Hodler.



Nürnberg: la movado centjaras!

Kiam Leopold Einstein kaj W. M. Trompeter entuziasmiĝis pri Esperanto en 1888, ili tiam certe ne antaŭvidis, ke 100 jarojn poste en ilia urbo Nurnbergo kunvenos preskaŭ 200 esperantistoj el 14 landoj por festi ilian kuraĝan decidon fondi Esperanto-grupon.

Bela vetero, agrabla etoso, bona organizado akompanis nin de la 21-a ĝis la 23-a de oktobro dum la jubilea aranĝo de tiu grupo. Por montri sian subtenon kaj estimon al Esperanto, la urbestro akceptis nin en la bela malnovstile rekonstruita urbodomo. En sia salutparolado li substrekis la gravecon de Esperanto por la paca kunvivado de la popoloj, kaj pri la rolo kiun ĝi povos ludi en la estonta Eŭropo. Tie en tiu agrablega etoso oni regalis la ĉeestantaron per tipaj Nurnbergaj kringoj kaj diversaj trinkaĵoj. Ĉiĉeroninoj de la urbo gvidis nin sabatmatene tra la pitoreska

Zamenhof en 1912, post atakoj de Hodler al Sebert, skribis al la generalo apogan leteron, en kiu li mencias kiel deziron de Hodler “submeti la tutan Esperantan aferon al UEA”. Zamenhof notis kun bedaŭro, ke neniue defendis Sebert kontraŭ la akuzoj de Hodler: ke la Centra Oficejo estas neutila, burokrata kaj deficit-krea institucio.

Ke Hodler kvar jarojn post la fondo de UEA povis tiel senpune ataki la gvidantojn de la movado, estas signo de la sukcesa vojo, kiun li ekiris en 1908. La membronombro de UEA konstante kreskis (estis jam en 1914 pli ol 7 000 anoj), kaj pli kaj pli grandiĝis ankaŭ la delegita (anstataŭ konsula) reto. Inter 1909 kaj 1913 estis plenumitaj 45 000 praktikaj servoj.

Ni nun iom pli detale rigardu, kiajn pensojn havis Hodler, fondante UEA.

La elirpunkto de Hodler estis la observo, ke la esperantistoj satiĝis pri la prilingvaj diskutoj (kulminintaj dum la Ido-krizo) kaj perdis la fidon je baldaŭa venkigo de Esperanto per la subteno de registaroj kaj aliaj aŭtoritatoj. Li nomis pasintaĵo la emon proponi Esperanton kiel lingvon *estonte* utilan (nome kiam la tuta mondo estos ĝin alpreninta) kaj kontraŭmetis al tiu propaganda metodo la argumenton, ke Esperanto *jam nun* utilas kaj ke ĝi jam nun estu utiligata. Por respondi al tiu bezono kaj por plue evoluigi la utilon de Esperanto, estis kreita UEA: UEA starigas servojn, “tuj uzeblajn de tiuj homoj, kiuj en tiu aŭ alia fako partoprenas en la vivo internacia kaj bezonas

urbocentro, kie je la fino de la ekskurso aŭtobusoj atendis por reveturigi nin al la kunvenejo "Kulturverein" por la komuna tagmanĝo, denove kun Nurnbergaj specialaĵoj.

Vigla diskuto okazis posttagmeze kun la vicprezidanto de UEA s-ro G. Maertens, pri la diversflanka agado de UEA. La fervojistaj arĉorkestro kaj koruso de la urbo plezurigis niajn orelojn dum la festvespero, alterne kun la salutoj de la eksterlandaj gastoj, i.a. s-ro Walter Mudrak el Vieno, kiu emocie rakontis pri sia partopreno en la amasege vizitita 15-a UK en Nurnbergo en 1923. Barbara Pietrzak salutis nome de Radio Polonia, kaj poste detale raportis pri la tuta aranĝo. Festparolis d-ro W. Bormann, vic-prezidanto de la Akademio de Esperanto. Li substrekis la gravecon de lokaj grupoj por la pluvivado kaj kreskigado de Esperanto, ĉar ili estas la kolonoj apogantaj Esperanton. La magiisto Reinhold Maier sukcesis trompi per siaj trukoj la ĉeestantojn, kaj la dancemuloj saltetadis ĝis meznokte.

Dimanĉmatene Claude Piron, la konata svisa oratoro kaj verkisto, komparis kun Esperanto diversajn historiajn inventaĵojn kiuj grave influis la interhoman komunikadon. Li menciis interalie la iom-post-ioman enkondukon de la arabaj ciferoj anstataŭ la romiaj, kies fina venko okazis nur post kelkaj jarcentoj. En tiu senco Esperanto ankoraŭ estas juna, do la vojo al la "fina venko" ankoraŭ longa.

La Nurnberga Esperanto-Grupo inde festis sian centjariĝon kaj la organizintoj nepre meritas laŭdon pro tio.

Katrin Bossong (Nederlando)

rilati kun aligentanoj . . . , servojn por vojaĝantoj, por virinoj, por junuloj, por komercistoj . . . La varbitoj lernos Esperanton por ricevi la priparolitajn servojn . . ."

La kreo de UEA, laŭ Hodler, karakterizas do novan fazon – transiron de predikado al praktikado – la fazon de esperantismo "eniranta en la vivon kaj ekzistanta per siaj propraj fortoj". "Idealo, kiun oni ne povas eĉ parte realigi, estas socie senfrukta."

Hodler mokis pri la uzo de nacia lingvo en grupkunvenoj kaj pri la kategorio de aprobantoj nesciantaj Esperanton. Kiel Privat skribis, lin ĉiam karakterizis "fiera kaj ironia malŝato al ĉiaj supraĵaj kaj ceremoniaj aproboj". Hodler foje ankaŭ skribis, ke la esperantistoj ne postkuru registarojn, sed per sia agado klopodu atingi, ke la registaroj turnu sin al ili.

Sed Hodler ne estis nur praktikulo, pensanta pri la delegita reto kaj la servoj de UEA. La signifo de lia verko ne nur troviĝas en tio, ke li inspiris en la esperantistoj memfidon – la konscion, ke Esperanto vere estas jam utila. Ĝia signifo estas pli vasta. Nome, Hodler ankaŭ donis al la movado tion, pri kio Zamenhof malsukcesis. Hodler donis al ĝi ideologion. Li difinis la esperantismon – difference de pure lingva movado laŭ la Deklaracio de Bulonjo – kiel precipe socian, konstruan kaj progreseman movadon. La praktikaj servoj kaj idealismaj celoj fakte formis ne-disigblan unuon en UEA.

Jen kiel Hodler komprenis la esperantismon:

Raportoj pri Esperanto-kursoj tra la mondo, rakontoj, teatraĵetoj, rol-ludoj, kantoj, poemoj, tabul-ludoj, bildstrioj, konkursoj kun premioj: ĉion ĉi vi povas trovi en la lernejana revuo

JUNA AMIKO

La prezo de jarabono (4 numeroj) restas senŝanĝa: 8,40 gld. ĉe UEA. Perantoj en multaj landoj akceptas abonojn en nacia valuto. Petu specimenon kaj varbilon de Hungara Esperanto-Asocio, pf. 193, H-1368 Budapeŝto.

INSTRUISTOJ REAGU!

Unu el la taskoj de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) estas katalogi ĉiujn Esperanto-kursojn kaj -klasojn tra la mondo, por formi superrigardon pri la kvanto kaj kvalito (grado de oficialeco) de instruado. Ni jam havas konkretajn informojn pri la universitat-nivelaj kursoj pro la laboro de s-ro G. Pirlot en la ĉiujara *Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo* (mendebla ĉe UEA). Ni volas nun arigi similan statistikon pri instruado en elementkaj mez-lernejoj (t.e. lernantoj inter 5- kaj 18-jaraj). Tiucele ILEI pretigis demandilon por la studjaro 1988-1989. Ĝi aperis en *Juna amiko* 88/3, en *IPR*, kaj en iuj aliaj gazetoj. Kiu ne vidis tiujn gazetojn a) tuj abonu ilin; b) petu ekzempleron de la demandilo de *Juna amiko*, p/a Hungara Esperanto-Asocio, poŝtfako 193, H-1368 Budapeŝto, Hungario. Redaktoro de movada gazeto, kiu pretas aperigi la demandilon, bv. peti prespretan originalon de la sama adreso, en formato A5 aŭ A4.

Niaj propagandistoj ne timu klare konigi la socian signifon de esperantismo, la neeviteblan plisolidarigon, kiun rezultigas tiu senĉesa reciproka servado kaj alproksimiĝo sur neŭtrala kampo, kie ĉiuj homoj juste kaj egale interkomunikas, kiu ajn estas ilia lingvo, nacio, opinio, kaj cetere.

En parolado dum la UK en Bern (1913) li diris:

Estas la honoro de esperantismo, ke ĝi penas anstataŭ[igi] la pure teorian internaciismon per praktike travivata internaciismo, kiu, ne embarasante sin per formuloj aŭ doktrinfasadoj, rilatigas fremdulon kun fremdulo pri ĉiuj sferoj de la homa vivo, sur vere neŭtrala kampo. Per sia interŝanĝado de servoj ĉiujare pli multe uzataj, UEA ne sole donas propran profiton al la uzantoj de tiuj servoj, sed ĝi praktike instruas al ili internacian spiriton, t.e. klarajn ideojn kaj ĝustajn konojn pri la vivo kaj mentaleco de la diversaj popoloj, sen kio ĉia alia jura alproksimiĝo estas neplenumbla en vere sincera maniero.

Hodler do, unuflanke, turnis sin kontraŭ tio, ke esperantistoj atendu ĝis la ekstera mondo pretos akcepti ilian lingvon. Li inspiris en ili memfidon pri la atingoj faritaj per propraj fortoj. Aliflanke, tiu memfido ŝajnis al li samtempe legitimigi la provon fieri turni sin al la ekstera mondo, nome montri sin al ĝi kiel avangardo de nova mondordo.

La cetera duono de ĉi tiu artikolo de Ulrich Lins aperos en la januara numero.

Lingvistoj renkontas Esperanton en Budapeŝto

“Pardonu – ĉu mi rajtas demandi, kiun lingvon vi estas parolantaj?” Tiaj demandoj foje ricevas verŝajne ĉiu aktiva uzanto de Esperanto. Kutime sekvas ia esprimo de miro, kiel “Ĉu vere? Mi ne sciis, ke tion oni povas efektive paroli!”

En Budapeŝto, en la lasta aŭgusto, la demandoj sonis iomete malpli naive, ekzemple: “Ĉu tio estas Esperanto, kion oni parolas ĉe la apuda tablo? Mi neniam aŭdis ĝin parolata antaŭe.” La demandojn faris iuj el la pli ol cent partoprenantoj de internacia (anglalingva) konferenco “Novaj direktoj en permaŝina tradukado”. Organizis ĝin la nederlanda kompanio BSO kaj la hungara informadika instituto Societo Neumann. Ne mirige, do, ke Esperanto kaj la DLT-projekto estis plurfoje tuŝitaj en prelegoj kaj diskutoj, nek ke la prelegoj inkluzivis kontribuojn de Wera Blanke, Claude Piron, Dietrich Weidmann kaj Klaus Schubert, nek ke Esperanto estis ofte aŭdebla koridore kaj manĝotable. Pli surprizaj estis la pozitivaj aludoj al Esperanto fare de pluraj aliaj prelegantoj, inkluzive de elstara ĉefa fakulo Petr Sgall. Tiu, post erudicia ferma parolado, en kiu li analizis kaj resumis la laborojn de la konferenco, konkludis per la neatendita rekomendo, ke ĉiuj lernu Esperanton!

La BSO-konferenco estis la dua el tri sinsekvaj lingvistikaj kongresoj en Budapeŝto, en kiuj diversmaniere rolis Esperanto. Antaŭ ĝi okazis malgranda konferenco pri “Struktura kaj socilingvistika esploro de Esperanto” (sub aŭspicioj de la Lingvistika Instituto de Hungara Scienca Akademio, de la Esperanto-Fako de la Budapeŝta Universitato, kaj de Hungara Esperanto-Asocio); post ĝi okazis la monda kongreso pri komputila lingvistiko “Coling”, kun pli ol 500 partoprenantoj.

Estas memkompreneble, ke la esperantologia aranĝo intense okupiĝis pri Esperanto. Ambicia programo rezultis, pro diversaj nealvenoj, malpli ekvilibra ol planite; tamen dudeko da referantoj pritraktis tutan gamon da temoj ekde ortografiaj normoj ĝis lerneja instruado. Ĉi tie ne indas resumi: la interesitoj prefere atendu la promesitan eldonon de la referaĵoj. Kvankam la aranĝo enhave sukcesis, ĝi bedaŭrinde apenaŭ allogis publikon, kaj la prelegantoj deĵoris samtempe kiel aŭskultantaro. La fakto, ke la organizantoj provis malfermi la konferencon al alilingva publiko, deklarante ankaŭ la anglan ĝia oficiala lingvo, havis kiel solan rezulton, ke la esperantlingva publiko devis ĝentile aŭskulti unu anglalingvan prelegon pri pozitivaj kaj negativaj trajtoj de Esperanto el la buŝo de iu, kiu mem ne scipovas la lingvon. . . . Eble venis la horo por agnoski, ke tiaj provoj mikslingvumi ne donas tre dolĉajn fruktojn, kaj por anstataŭe aranĝi esperantologian konferencon tute en tiu aŭ alia nacia lingvo, kun la celo prezenti Esperanton lingvistike al tiuj lingvistoj, kiuj scivolas pri ĝi.

Ke scivolo ekzistas kaj kreskas, tio evidentiĝis dum la posta komputil-lingvistika konferenco “Coling”, kiu estis komplete anglalingva spite al la fakto, ke pluraj aliaj lingvoj estis “oficialaj”. La scivolon nutris prelegoj de Toon Witkam kaj de Klaus Schubert pri apartaj aspektoj de la


DLT-sistemo de permaŝina, peresperanta tradukado. Dum la tuta semajno, aparta budo de BSO reklamadis la DLT-projekton, kaj ĉiu interesiĝanto konfrontiĝis vole-nevole kun Esperanto pere de la ekspoziciitaj grafikaĵoj kaj perkomputilaj demonstroj. Krome, duonhora aŭdvida prezento pri DLT ripetiĝis plurfoje dum la semajno, unuavice en angla versio, sed ankaŭ foje en Esperanto. Kvazaŭ por montri, ke ne nur BSO okupiĝas serioze pri la lingvo, alia stando prezentis la parolsintezan programon ellaboritan en la Budapeŝta Teknika Universitato, kaj kiu estis surloke demonstrata en la hungara, en la germana, kaj – en Esperanto.

V. Sadler

21-A PUPTEATRA INTERNACIA FESTIVALO

Kaptu la pupteatrajn ŝancojn

Inter la 25-a kaj 31-a de aŭgusto 1988 okazis en Zagrebo la 21-an fojon Pupteatra Internacia Festivalo (PIF). Nun la statistikoj malfacilas. Dum la 21 festivaloj, kun meze 15 teatroj en ĉiu, prezentiĝis en Zagrebo pli ol 300 profesiaj teatroj de la mondo (el kvardeko da landoj) – inter kiuj pli ol 200 ludis en Esperanto! El ili 25 estis prezentitaj en la jugoslavia televido, preskaŭ ĉiam en Esperanto (kun subtitola traduko). PIF nun jam estas fama festivalo inter la pupistoj kaj fake unu el la alt-renomaj. Ĉiujare vizitas ĝin iu el la plej famaj pupfakuloj aŭ membroj de la plej supera organo de pupistoj



UNIMA, kaj en Jugoslavio ĝi estas taksata kiel tre grava kultura manifestaĵo.

Al la 21-a PIF anonciĝis kvindek da pupteatroj, el kiuj 20 estis akceptitaj kaj 19 efektive partoprenis: du el Francio, du el Svedio, po unu el Bulgario, Pollando, Sovetunio, Norvegio, Italio, Ĉeĥoslovakio kaj Hungario, kaj sep el Jugoslavio. El ili ni povis vidi ses spektaklojn en Esperanto dum la tri unuaj festivalaj tagoj, kio estis la ĝis nun plej malgranda proporcio kompare kun la nombro de nacilingvaj spektakloj.

Rigardante el Esperanta vidpunkto, oni povas bedaŭri ke PIF ĉi-jare fakte havis nur malmultajn spektaklojn en la internacia lingvo. Kaj tiu ĉi tendenco restos, se la esperantistoj daŭre nesufiĉe helpas al la granda kaj por la Esperanto-movado tre prestiĝa manifestaĵo. Unue: Esperantistoj praktike ne venas kiel publiko al PIF. Ĉi-jare ni havis nur kvinon kiuj ne estis zagrebanoj aŭ ĵurianoj. Due: Pupteatrojn, kiuj foje faras prezenton en Esperanto aŭ havas E-spektaklojn en sia repertuaro, preskaŭ neniam invitas Esperanto-organizaĵoj de la propraj landoj ludi enlande okaze de nacilingvaj aŭ internaciaj Esperanto-aranĝoj. Sekve, granda plimulto el tiaj pupteatroj neniam faras prezenton en Esperanto krom en PIF. Pri tio ja disvastiĝis la famo inter pupistoj, kaj multaj teatroj ne plu volas klopodi prepari spektaklon en Esperanto por ludi nur unu fojon. Trie: Ankaŭ dum la preparoj, post kiam iu teatro jam estas akceptita por veni al Zagrebo, oficialaj E-instancoj preskaŭ neniam helpis al tiuj teatroj aŭ iel pli stimulis ilin. Ĉefe ili estas lasitaj al

Premioj el la Esperanto-sekcio de la 21-a PIF:

Uzo de Esperanto: pupteatroj el Toruń (Pollando)
kaj Blagoevgrad (Bulgario)

Premio "Jozefo Petrin": Vibeke Helgesen (Norvegio)

Premio "Tibor Sekelj": pupteatro el Växjö (Svedio)

Infanĵuria premio: pupteatro el Zagrebo (Jugoslavio)

Sube: La kanto de la ora arbaro (Norvegio)



hazardaj unuopuloj kiuj tradukas la tekstojn kaj eventuale helpas unu-dufoje al ili legi la tekstojn. Tial plej ofte la teatroj ne lernas E-on sed nur tekston parkere, sekve ne fariĝas esperantistoj.

Tial ni en la organiza teamo de PIF nun insiste petas esperantistojn tra la mondo plani sian alvenon al Zagrebo. Ĉiujare la lasta semajnfino de aŭgusto estas la Esperanta parto de PIF (vendredo, sabato kaj dimanĉo). Planu ĝui dekon da profesiaj teatraĵoj, inter kiuj estas kaj por-infanaj kaj porplenkreskulaj spektakloj en Esperanto. Kunvenigu vian tutan familion. La kostoj de la restado ne estas altaj. Vi povos loĝi en dultaj ĉambroj de student-hotelo kontraŭ proksimume 20 guldenoj nokte. Kompleta aliĝkotizo por plenkreskuloj estas 50 guldenoj; por infanoj ĝis 15-jaraj, nur 25 guldenoj! Ĝi rajtigas vin rigardi ĉiujn prezentojn.

Krome, ni ekde 1989 enkondukos plian novaĵon. Samtempe kun PIF ni okazigos Internacian Esperanto-Konferencon, kiu diskut-serĉos la vojon kiel malebligi la grandan forfalon de novuloj el la movado. Por la konferenco ni prizorgos kelkajn famajn esperantistojn kiuj enkondukos la temon.

Landajn asociojn ni petas informi ĉe ni, ĉu en via lando ekzistas pupteatroj jam ludintaj en Esperanto kadre de PIF, kaj inviti ilin al landaj E-aranĝoj. Ni transprenas la taskon informi tiujn LA, el kies landoj ni estonte elektos E-spektaklojn, ke ili helpu la preparojn de la elektitaj pupteatroj.

Fine, mi diru ke la faka ĵurio de la ĉi-jara PIF taksis la festivalon tre altkvalita, atribuite dekon da diplomoj al diversaj spektakloj kaj la ĉefpremion al la pupteatro "La Tartana" el Madrido por la spektaklo *Lear*...

Zlatko Tišljar

Internacia Kultura Servo
P.f. 499, YU-41000 Zagreb

FILMO KAJ FOTOGRAFIO

Jubilea ILEF-Festivalo

La Internacia Ligo de Esperantistaj Foto-kino-magnetofon-amatoroj (ILEF) estas unu el la vigle agantaj organizaĵoj kunlaborantaj kun UEA. Dum sia 25-jara ekzistado (ĝi estis fondita en 1963 dum la 48-a UK en Sofio), la organizaĵo faris multon por diskonigi al diversaj socimediaj en la mondo la atingojn de la internacia E-movado, uzante la plej modernajn rimedojn de komunikado – filmojn, fotojn, magnetofonajn surbendigojn.

Laŭ iniciato de Bulgara Esperantista Kino-foto-klubo, jam en 1963 ILEF akiris sian unuan kreaĵon: la dokumentan filmon *Flirtas verdstelaj flagoj*... pri la 48-a UK en Sofio. Sekvis multaj novaj atingoj, i.a. filmoj pri la UK-oj en Varno (1978) kaj Antverpeno (1982), kaj pri "Slânĉev brjag" (1984). Kadre de diversaj E-kongresoj (Sofio, Varno, Antverpeno, Budapeŝto, Aŭgsburgo k.a.) estis organizitaj internaciaj foto-ekspozicioj. La unua kino-foto-festivalo de ILEF okazis en 1985 en la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica kaj ĝuis grandan sukceson.

La plej granda atingaĵo de la organizaĵo ĝis nun estas la kolora dokumenta filmo dediĉita al la 100-jara jubileo de Esperanto. Laŭ iniciato kaj kunlaboro de la prezidanto de ILEF, Donĉo Ĥitrov, la elstara pola kinoreĝisoro Roman Dobrzyński kreis la 50-minutan verkon *Esperanto*, kiu estis prezentita kelkfoje kun granda sukceso dum la Jubilea Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio.

De la 10-a ĝis la 15-a de oktobro 1988, la nordokcidenta bulgara urbo Vraca estis gastiganto de la dua ILEF-festivalo, kiu okazis sub la aŭspicio de la urbestro, inĝ. Asen Nedjalkov. Tiu aranĝo koincidis kun la celebrado de la 25-jara jubileo de la organizaĵo kaj estis organizita sub la devizo "Por paca mondo, pura ĉielo kaj amikeco". En la festivalo sin prezentis per filmoj, fotoj kaj diapozitivaj esperantistoj el 15 landoj: Usono, Sovetunio, Britio, Francio, Belgio, Nederlando, FRG, Hispanio, GDR, Italio, Hungario, Ĉeĥoslovakio, Japanio, Bulgario, Pollando.

2-A KULTURA ESPERANTO-FESTIVALO

Kritiki Estas Facile...

... fari malfacile. Kaj bone fari, eĉ pli! Tio koncizigas miajn impresojn pri la 2-a Kultura Esperanto-Festivalo (KEF 2) en Lund, suda Svedio, de la 18-a ĝis la 21-a de aŭgusto 1988. Mi ne povas rememori, ĉu kvindekope, ĉu centope ni renkontiĝis en tiu trankvila kaj histori plena urbeto. Ni alvenis por ripozi en kultura etoso, alternative je la amasaj kongresoj, kaj la organizintoj ne desapontis nin. Tiuj konsistis ĉefe el svedaj gejunuloj, cetere ĉefe stokholmaj (atentinda fenomeno!); specialan dankon indas Per-Aarne Fritzon, ĉiam postkulise.

Se neglekti nun la nure kongresajn detalojn, mi rimarkigas diversajn aspektojn de la kultura programo.

Unue, "La Krizalido" teatris la verkojn "Buba gefianĉiĝo", "Geecoj", "La ŝtona gasto", kaj du originalaĵojn de Serĝo Elgo.

Due, prelegoj de Paul Thorsen pri tabuesprimoj en Esperanto kaj de Perla Martinelli pri Literatura Foiro. Ankaŭ nia eksperimenta poeto Jarlo Martelmonto ajnis siajn poemojn kun muzika kaj bilda fonoj. Dum la talenta vespero Sten Johansson laŭtleĝis sian novelon "La ĉokolada biskvito", premiitan en la Belartaj Konkursoj. Aliaj konataj homoj spicis la diskutojn, ekzemple A. Pettyn, G. Lagrang, L. G. Nordenstorm, G. Silber, ...

Trie, muziko por ĉiaj gustoj: verdstelema kaj zamenhof-ama Jerzy Handzlik, senhonta blus-kanzon-ĵaz-folklora TBC (el Hungario, sed kun dana kunlabora prezento), kormuzika Nikolin' (mendeblas LF-koopas kasedo), kaj ... rokmuziko.

La rokgrupo Persone, nun sen saksofono, prezentis novajn kantojn samnivelajn kiel tiuj de la kasedo *62 minutoj*. Kim, eksa Amplifiki-ano, kantis proprajn kantojn (kiel "Nelson Mandela") kun Persone kiel akompana bando. Fine, Mikke kaj Per Ola, respektive eksaj gitaristo kaj saksofonisto el respektive Amplifiki kaj Persone, kune surprizis nin per agrabla, freŝa debuto. Ĉiuj tri rokaĵoj sukcesis ĝisŝvite dancigi la junan publikon.

Mi esperas ke KEF, viva elmontro de krea originala Esperanta kulturo (sen manifestoj kaj kontraŭ-

En la Domo pri Kulturo ĉe la Kemia Kombinumo estis aranĝita internacia foto-ekspozicio, kun pli ol 35 foto-kolektoj de apartaj ILEF-anoj.

Al la festivalo montris grandan intereson la amas-komunikiloj en la lando, la publiko el Vraca, kaj la regiono ĝenerale. La Ministerio de Komunikado eldonis specialajn poŝtkoverton kaj stampon kun la emblemo de ILEF. Per speciala premio de la urbestro de Vraca estis distingita la filmo *Esperanto*. Granda Premio "Arĝenta kolombo" estis aljuĝita al la filmo *Ĉarmaj Rodopoj* de José F. Arroyo el Hispanio, al la Sofia Esperanto-kinoklubo "Verda objektivo", kaj al doc. Kiril Velkov el Vraca pro liaj altkvalitaj diapozitivaj.

La dua ILEF-festivalo estis sukcesplena kaj denove elmontris la strebadon kaj la entuziasmon de la membroj de la organizaĵo al ĉiam pli altaj artaj atingoj.

D. Simeonov (Bulgario)



NOVA POSTENO POR LA PREZIDANTO DE UEA

D-ro Humphrey Tonkin, UEA-prezidanto inter 1974 kaj 1980 kaj denove de 1986, fariĝos la prezidanto de la Universitato de Hartford, en la usona ŝtato Connecticut, ekde la komenco de 1989.

Dum la pasintaj kvin jaroj, d-ro Tonkin estis la prezidanto de la Kolegio Potsdam, unu el 13 branĉoj de la Ŝtata Universitato de Novjorko. La ĉefkonsilio de Hartford, mezgranda neŝtata universitato, elektis lin el inter 167 kandidatoj por sia ĉefposteno.

Specialisto pri la angla renesanca literaturo, Tonkin krome aktivas pri internacia edukado ĉe la tut-usona nivelo, en diversaj komitatoj kaj komisionoj. Li antaŭvidas, ke lia nova posteno donos i.a. pli bonan bazon por la kontaktoj de UEA kun la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko.

La nova adreso de Tonkin, **valida ekde la 1-a de januaro**, troviĝas en la kolofono ĉe la interna frontkovrilo.

manifestoj), plu ekzistos ankaŭ post eventuala IJK en Svedio. Ĝuste ĉi tiajn junajn altkvalitajn tradiciojn ni devas pleje varti. Ĉar mi nepre volas refoje KEF-iri ... ĉu en 1990?

Georgo Kamaĉo (Hispanio)

“Ke vi restu ĉiam juna” (Bob Dylan)

La malfacilaĵoj de internacia organizado multobliĝas kiam temas pri mastrumo de junulara asocio. Mankas mono, mankas sperto, ne malofte mankas kontinueco pro la aĝiĝo kaj malapero de iamaj gvidantoj. Eble tiaj problemoj kaŭzis, ke Esperanto jam festis sian duonan jarcenton antaŭ ol ekaperis longviva internacia junulara asocio.

Tutmonda Junular-Organizo, kiu fondiĝis la 14-an de aŭgusto 1938 en Groet (Ĥrut), Nederlando, cetere komencis la vivon kiel instruista iniciato. S-ino E. van Veenendaal-Bouwes, 40-jara, SAT-membro kaj la redaktoro de revuo por junaj komencantoj *La juna vivo*, kunvokis “Internacian Junularan Kunvenon”, kies 200 partoprenantoj (el kiuj du trionoj estis infanoj) starigis organizaĵon kun la jenaj celoj: “konsciigi la junularon pri tutmonda interfrateco kaj akceli ĝin” per (a) propagando de Esperanto, (b) aranĝado de internaciaj renkontiĝoj, (c) komuna gazeto (*La juna vivo*), (ĉ) korespondado, kaj (d) aliaj indaj rimedoj, kaj ankaŭ “akceli, ke Esperanto estu akceptita en la lernejojn”. En la unuan estraron eniris kvar junuloj inter la aĝoj 18 kaj 25, kaj kvar plenkreskuloj-instruistoj.

Esperanto en perspektivo citas strofon de “Junulara marŝo” el la dua IJK, en Tervuren (Belgio) la postan jaron, kiu redonas la skoltecan etoson de tiu frua TJO:

Ni man' en man' en kolektiv'
Kantante iras en la viv'
Ni junular', tra kampo kaj arbar'.

Filmo el tiu kunveno, kies 400-opa partoprenantaro spegulis la forton de jam pli ol 800-membra asocio, fidele registras la trakampan migradon kun verdaj flagoj.

La Dua Mondmilito, ekinte en septembro 1939 kaj trafinte Nederlandon en majo 1940, metis fruan finon al ĉio ĉi. Tamen, jam en aŭtuno de 1945 reaperis *La juna vivo* (denove redaktata de s-ino van Veenendaal) kaj en aŭgusto 1946 diverslandaj reprezentantoj kunvenis en Blankenberge, Belgio, por reaktivigi la asocion: jarfine oni registris 931 membrojn en 17 landoj. En 1947 la tria IJK en Ipswich, Britio, allogis 200 partoprenantojn; en aŭgusto TJO fariĝis faka asocio de la renovigita UEA; en 1948, 285 anoj festis la dek-jariĝon en la fondvilaĝo Groet. Indas memori, ke temis ankoraŭ plejparte pri asocio de instruistoj kaj lernejoj, kies ĉefaj agadoj estis la lerneja revuo kaj ĉiujara renkontiĝo.

Iom post iom, tamen, TJO transformiĝis en plene junularan asocion. La 6-a IJK (1950) en Konstanz, FR Germanio, rezoluciis pri minacoj al la paco kaj fondis oratoran konkurson; la postan jaron kreigis estraro konsistanta tute el junuloj. Kvazaŭ por definitivigi la aliformiĝon, en la 8-a IJK en Ry, Danlando (1952), oni ŝanĝis la nomon al la hodiaŭa TEJO. Kaj en la sama kongreso, malgraŭ la estiĝo de gravaj financaj problemoj, oni alprenis la principon de kolektiva membriĝo de landaj

sekcioj, fondis informan fakon kaj ŝanĝis la gvidliniojn de *La juna vivo*.

La sekvaj jaroj vidis la komencan baraktadon de junulara organizo kontraŭ la problemoj de mono, komunikado kaj homfortoj. El la rezulta malcerteco kondukis nova vojo: plena integriĝo kun floranta UEA, kiu kun 6 460 individuaj membroj fine de 1956 estis je la pinto de sia postmilita ekkresko. Tiujare la 300 TEJO-

Kion interŝanĝi, kiam oni ne parolas komunan lingvon? Oni interŝanĝas insignojn, aŭtografojn, ridetojn, kisojn. Estas psikologie komprenebla fakto, ke ju pli oni ne povas interkompreniĝi, des pli oni obligas la amikecajn signojn.

... estas facile por ni, esperantistoj, ironii pri... naivaj ideoj aŭ indigni ĉar... oni malaltigas nin, konsciajn gejunulojn, ĝis la rango de tiuj diplomatoj kaj ministroj, kiuj amikece gestas unu al la alia por kaŝi siajn malakordojn. Sed ironio aŭ indigno el nia flanko tute ne efikos, se ni ne agas celkonscie kaj tre pacience por ŝanĝi iom post iom tiun situacion.

Michel Duc Goninaz (La juna vivo, nov.-dec. 1955)

anoj en la 12-a IJK en Büsum, FR Germanio, rezoluciis por fariĝi la junulara sekcio de UEA, kaj la samjara 41-a UK en Kopenhago akceptis la proponon kaj la principon de aŭtomata membreco de junaj UEA-anoj en TEJO. De novembro 1956, *La juna vivo* fariĝis rubriko en la revuo *Esperanto*; sur firma membra kaj financa bazo, TEJO estis preta por la eksplodo de agado, kiun kunportis la posta jardeko.

La unuaj kvin jaroj post la aliĝo al UEA vidis kreskon ĝis 19 landaj sekcioj, la unuan IJK en socialisma lando (Varsovio, 1959), la unuan laborplanon (akceptita en Ystad, 1962), kaj la lanĉon de la Internaciaj Seminarioj de Germana Esperanto-Junularo kaj de aliaj sendependaj



“Tra kampo kaj arbar’” ĉe la 21-a IJK: inter movado kaj migrado.

aranĝoj. Jam frue komenciĝis diskutoj pri la celoj, principoj kaj agadoj de la junulara sekcio disde la pli granda UEA. Informado, la rilatoj kun ne-esperantistaj junularaj organizaĵoj, kaj la diskutado de junularaj temoj kaj problemoj fariĝis apartaj agadkampoj de TEJO. Dum la “Jaro de la Junularo en la Esperanto-Movado” (1963) okazis rekorde granda IJK (540 homoj en Varna, Bulgario), oficialaj interparoloj kun la plej grandaj internaciaj junularaj organizaĵoj, kaj la lanĉo de la junulara revuo *Kontakto*.

Ke TEJO jam komencis plenumi la rolon de trejnejo por UEA-aktivuloj montras la elektoj en 1964: Günther

[La naciaj sekcioj] havas specialajn karakterizojn kaj esencan individuecon. Sed TEJO restis ia nebula organizo, neebila kontribui al la vivo de siaj sekcioj, nenion atinganta, nenion celanta. Ni volas per Kontakto doni al TEJO karakteron, kaj montri ke ĝi ja ne estas inerta kaj senviva organizo. Ni celas ne simple liveri al vi en Kontakto nur ankoraŭ alian novaĵ-foliaron aŭ anoncaron, sed veran gazeton, kies enhavo ne pritraktu simple Esperanton, sed ankaŭ tiujn problemojn, kulturajn kaj sociajn, kiuj tuŝas la junularon, kaj tiujn apartajn interesojn kiujn havas gejunuloj.

Humphrey Tonkin (Kontakto 1, 1963)

Becker, prezidanto ekde la sekciigo de TEJO en 1956, fariĝis ĝenerala sekretario de la plenkreskula asocio; la nova TEJO-estraro enhavis i.a. Humphrey Tonkin (vicprezidanto), Ulrich Lins (kasisto), Yosimi Umeda (membro), kune kun pluraj talentuloj kiuj nun aktivas en landaj movadoj, dum Hans Bakker – nun la UEA-komisiito por Afriko – fariĝis redaktoro de *La juna vivo*. Dum la sekvaj jaroj, TEJO ekestis kredeble la plej aktiva kaj eltrovema organizaĵo de la movado: ĝiajn fak-seminariojn partoprenis internaciaj ne-esperantistaj organizaĵoj; ĝiaj gvid-seminarioj plenigis la mankon de organiza trejnado por novaj gvidantoj; en Argentino oni elpensis la “Pasportan Servon”, kiu poste ĝeneraliĝis al tutmonda reto; la kunlaboro kaj informfluo inter TEJO-aktivuloj estis unike bona. Precipe unu malhelpo ĝenis: montaj deficitaj en la buĝeto.

La sociaj skuoj de la sesdekaj jaroj trovis eĥon en TEJO, kondukante al la Deklaracio de Tyresö (1969). En ĝi kvazaŭ kristaliĝis movada filozofio, pli ligita al evoluoj en la ekstera socio ol estis tiu reganta en la pli aĝaj rondoj. “Ĉiuj ajn aktivecoj pri lingvaj problemoj estas samtempe sociaj aktivecoj,” rezoluciis la kongresanoj, kondemnante la “lingvan imperiismon” kaj alvokante “plivastigi la dimension de la individuo en la socia kaj teknologia evoluo”. De tiam, ĉiu IJK celos esti forumo por la priparolo de iu aktuala politika-socia temo kun rilato al la junularo – ideo nun kutima, sed tiam reprezentanta profundan ŝanĝon en la TEJO-koncepto de sia statuta neŭtraleco.

Tiu ŝanĝo cetere pliakrigis la konfliktojn, kiuj jam ekzistis inter la TEJO- kaj UEA-estraroj; en la fruaj sepdekaj jaroj plioftiĝis reciprokaj akuzoj de politika partiececo ĉe la unua, aŭ de deziro subpremi la liberan pensadon kaj diskutadon de junuloj ĉe la dua. Kiam en

la 59-a Universala Kongreso en Hamburgo kulminis tiu batalo pri du kontrastaj gvid- kaj enhav-stiloj, TEJO-aktivuloj intense partoprenis la komitatajn diskutojn, kaj du iamaj TEJO-prezidantoj – Tonkin kaj Flóra Szabó-Felső – eniris la novan UEA-estraron. “Generaciaj ŝanĝoj”, proklamis la revuo *Esperanto*, iusence prave, kvankam la kontinueco inter la antaŭ- kaj post-Hamburga UEA estis multe pli granda ol la antaŭaj konfliktoj aŭguris. Szabó-Felső cetere restis prezidanto de TEJO dum plia jaro antaŭ ol cedi sian lokon al Claude Nourmont.

La TEJO de la sepdekaj jaroj plu naskadis nomojn nun bone konatajn ekster junulaj rondoj: Klaus Schubert, Paul Peeraerts, Bruĉjo Kasini, Stefan MacGill kaj aliajn. Finiĝis la periodo de rapida kresko kaj eksperimentemo; sekvis jaroj de solida daŭrigo. La Komisiono por Eksteraj Rilatoj organizis regulajn kaj altkvalitajn seminariojn. *Kontakto* aperigis foje eksterordinare bonajn artikolojn kaj analizojn pri movadaj kaj nemovadaj temoj, en grafika formo sufiĉe bela. La IJK-oj altiris inter 250 kaj 450 partoprenantojn. Iom post iom la nombro de membraj asocioj kaj individuaj membroj kreskis, kvankam la landajn sekciojn, krom la plej fortajn, ĉiam karakterizas – ĝis hodiaŭ – nestabileco. Kaj alia daŭra problemoj, antaŭe ne tiel sentebila, komencis ĝeni la funkciadon: la malgranda nombro de kernaj aktivuloj, kiuj povis certigi kontinuan laboron inter la kongresoj.

La tradiciaj TEJO-agadoj, kies formon kaj celaron heredigis la sesdekaj jaroj, ekperdis sencon kaj allogon por la alispeca junularo el la fino de la sepdekaj. Unu simptomo estis la Manifesto de Raŭmo (1980), kiu

Se oni konsekvence aplikas la koncepton pri konservado de la integreco de la individuo, oni nepre venas al malaprobo de lingva kaj kultura diskriminacio en ĉiu formo, al malaprobo de ĉiu tiel nomata solvo de la lingva problemoj kiu baziĝas sur diskriminacio, kaj al konstato, ke oni ne sufiĉe atentis la detruadon de la kultura kaj lingva fono de multaj popoloj. Tiu detruado estas nenio alia ol instrumento de la lingva imperiismo.

Deklaracio de Tyresö, 1969

dubindigis la celadon konvinki ekstermovadajn instancojn pri Esperanto, kaj emfazis la internan uzadon de la lingvo kiel superan valoron. Kvankam tion la Manifesto eventuale ne celis, ĝi spegulis ian emon reiri al la pramodelo de renkontiĝoj kiel celo en si mem. Similan tendencon spegulis la enhavo de *Kontakto*, kiu ekmalpolitikiĝis, ekpresis artikolojn ankaŭ de ne-junuloj, kaj de post la unua numero de 1983 celiĝis parte al komencantoj – transformiĝinte en ĝeneralan soci-kulturan revuon sen aparta tema ligo al TEJO. Tion ebligis, cetere, la fondo de *TEJO-tutmonde*, primovada revuo kiu post iom malregula komenciĝo en Kanado (1983-84) trafis aktivan kaj ambician svisan redaktoron, Andy Künzli. (El la 32-paĝa julia-aŭgusta numero de ĉi tiu jaro mi cetere ĉerpis plurajn informojn por ĉi tiu artikolo.)

Ni jam venas iom tro proksimen al la nuna tempo por komforto. Tamen eblas objektive, koncize konstati, ke la kvindekjariĝo trovas TEJO-n meze de krizo. De kelkaj

Se oni celis forigi la limon inter Esperantujo kaj la cetera mondo, kuraci la movadan introvertitecon, oni kompreneble parte sukcesis, sed samtempe eĉ firmigis tiun limon. Iuj volas legi en Esperanto nur pri Esperanto – la ribeluloj volis nepre ne legi pri Esperanto en Esperanto. Nur mia antaŭulo Giorgio Silfer rimarkigis pri la vera solvo: paroli pri Esperanto en nemovadaj kunteksto, kaj inverse.

Finfine ne estas nia tasko gardi esperantistojn kontraŭ eskapismo. Estas sub ilia propra respondec, ke malgraŭ Esperanto ili restu aktivaj civitanoj interesigantaj pri ĉio, kio okazas en la mondo. Se ili ĉiuj forgesus pri tiu devo, mi ne kontraŭbatalus, simple nur fermus la butikon.

Jouko Lindstedt (Kontakto 55, 1977)

jaroj la estraroj malglate funkcias, kaj nur ĉi-jare oni rekaptis ian regon super la financoj; la IJK-oj preskaŭ sendependiĝis, tiel ke la LKK-oj de Krakovo, Zagrebo kaj la venontjara Kerkrado apenaŭ havas rilaton kun TEJO kiel organizaĵo; eksteraj rilatoj lamas kaj ofte perdis la originan celon. Ve-krioj el la nuna jaro: “La kaso estas malplena, la membroj iome izoliĝis de la elektitaj gvidantoj”; “mi ne riproĉas libervolajn deĵorantojn, sed asocion, kiu dediĉas siajn rimedojn al propagando, reprezentado kaj diskutado, neglektante la anojn” (ambaŭ el *TEJO-tutmonde* 35). La kongresa rezolucio el Zagrebo, kiu celis marki la kvindekjariĝon, estis perfekte senenhava, kaj ĉiuj komitataj decidoj el tiu kongreso devas esti revoĉdonitaj pro malobservo de la regularo kaj pro manko de kvorumo.

Nu, krizoj estas sufiĉe naturaj en la vivo de organizaĵoj. Tiu ĉi ne estos ĉiama, kaj eble jam nun oni ekvidas ĝian finon. Precipe esperigas la vigleco kaj multnombro de la junularaj movadoj en multaj landoj, ne nur en Eŭropo (Pollando, FR Germanio, Jugoslavio, por nomi nur tri okulfrapajn ekzemplojn) sed ankaŭ en Latina Ameriko, Azio, kaj tiuj afrikaj landoj kiuj ja havas movadon. La malfermiĝo de Sovetunio kaj Ĉinio havas grandajn sekvojn. Verŝajne la estonta TEJO devos pli ligi kun tiuj lokaj koncentriĝoj, kiuj provizas laborforton kaj entuziasmon por kontraŭefiki la malgrandecon de la centro. El piramido ĝi fariĝu reto.

Por funkciigi reton tutmondan, ia centro tamen estas esenca. Tial gravas la principoj de demokratio kaj komunikado, kiujn aludis la supraj vekriantoj. Interese, UEA kiel tuto frontas la samajn problemojn kaj defiojn. Malgraŭ ĉia komuneco, lastatempe apenaŭ okazis utilaj diskutoj inter la du aloj de UEA: la junularo akuzas, ke la “mal-TEJO” neglektas ĝin; la “maltejanoj” vidas, ke la junularo samtempe neglektas, eĉ publike malestimas la plenkreskulajn rondojn (ankaŭ Universalajn Kongresojn, ĉi tiun revuon ktp ktp!). La absurdo de tiu situacio devas esti evidenta al multaj, junuloj kaj nejunuloj same. Analoge al la sesdekaj jaroj, ĉu fine de la okdekaj ne eblas rekrei tiun reciprokan respekton kaj subtenon, sur kiu baziĝas ĉiu utila kunkonstruado? Jen lasta cerbumiga demando, honore al ambaŭ datrevenoj, por kies respondo daŭre pridisponeblos niaj paĝoj.

Mark Fettes (TEJO-ano ĝis 1987)

Ĉu jam troas, la emfazo pri historio ĉi-numere? Ne, se vi momente pensus pri kiom malmulte ni ĝenerale scias pri la pasinteco de Esperanto. Jen bela ekzemplo: la rolo de la internacia lingvo antaŭ plenaj sesdek jaroj en kontaktoj inter oriento kaj okcidento. Kiom da similaj trezoroj atendas niajn bibliotekajn fosantojn?

Ambasadoro en Nipono

En 1919 la juna respubliko Finnlando, sendependa de 1917, ligis diplomatajn rilatojn kun Japanio. La fama lingvisto Gustaf John Ramstedt [Ramstet], 1873-1950, fariĝis la unua finna ambasadoro, sendita al Tokio. Li estis specialisto i.a. pri la korea kaj mongola lingvoj. Estas interese, ke pro lia korea gramatiko la Korea Respubliko dekoraciis lin per alta ordeno – 35 jarojn post lia morto!

Sed Ramstedt estis ankaŭ esperantisto: inter la unuaj en Finnlando, li lernis la lingvon jam en 1891. En 1908 li faris en la Universitato de Helsinko lekciojn pri internacia lingvo kaj tiel fariĝis pioniro de akademia interlingvistiko. Li esperantigis multajn poemojn kaj verkis



Enciklopedio de Esperanto (1933-34):

“Per sia aŭtoritato kiel lingvisto kaj diplomato [Ramstedt] multe helpis al la movado ĉe la oficialaj rondoj. Dum sia restado en Japanujo [li] subtenis E-n en tiu lando.”

originale longan odon al la esperantistoj de Osaka. En sciencaj kaj publikaj medioj li kun sia tuta aŭtoritato ofte pledis por Esperanto. Inter la aktivuloj de la finna Esperanto-movado lia socia pozicio sendube estis la plej eminenta.

La proponita posteno en Tokio ne tuj entuziasmigis Ramstedt. Simpla kaj senceremonia vivo de sciencisto multe pli plaĉis al li ol tiu de politiko kaj diplomata etiketo. Tamen li akceptis la taskon kaj tiel el lingvisto fariĝis diplomato por plenaj 10 jaroj (1919-1929).

Pri siaj jaroj en Japanio Ramstedt poste verkis fascinan libron *Lähettiläänä Nipponissa* (Kiel ambasadoro en Nipono). En ĝi li rakontas ankaŭ pri siaj kontaktoj kun japanaj esperantistoj, kun kiuj li multe kunlaboris. Ĉi-sube ni aperigas tiujn erojn de liaj rememoroj.

* * *

Ramstedt veturis al Japanio de Londono per la ŝipo Shizuoka Maru. La ŝipo haltis en Ŝanhajo, kie multaj gazetoj intervjuis lin. Skribante pri tio Ramstedt aldonas: "Inter la intervjuoj troviĝis ankaŭ kelkaj esperantistoj, kiuj kompreneble trovis renkontiĝon kun Esperante parolanta ambasadoro aparte rimarkinda kaj ili tuj rigardis min kiel subtenanton de iliaj ideoj." (p. 28)

Per tio Ramstedt ŝajne komprenigas, ke la ŝanhajaj esperantistoj-jurnalistoj tiel skribis en siaj gazetoj.

* * *

Ankaŭ post sia alveno al Tokio la nova diplomato estis intervjuita por multaj gazetoj.

"Lige kun tiu unua inundo de intervjuoj mi venis en kontakton kun japanaj esperantistoj. Ili jam de longe atendis en mi helpanton kaj subtenanton por sia movado. Finfine tamen okazis, ke ili multe pli utilis al mi ol mi al ili. Precipe en diskonigado de Finnlando ili atingis multon sur pluraj kampoj. Kiam mi estis petita prelegi ĉe iu aranĝo, mi kutime faris tion en Esperanto kaj la interpretanto – precipe kiam temis pri Finnlando – kutimis siaflanke garni miajn vortojn per multo bela kaj favora pri nia lando." (p. 35)

* * *

"Aparte multajn konatojn mi akiris inter japanaj esperantistoj. Ilia afableco kaj helpemo efektive superis ĉion, kion mi atendis, kaj la prestiĝo, kiun multaj el ili ĝuis en la publika vivo de Japanio, faris mian agadon eĉ pli atingopova ol mi anticipis.

Ĉar mi apartenis al diplomataro, esperantistoj kompreneble speciale bonvenigis min inter si kaj siaj agadoj: mi ricevis sennombrajn invitojn por prelegi en diversaj partoj de la insula regno. Mi do utilis mian scion de Esperanto ĉe prelegoj pri Finnlando, ĝiaj popolo, naturo kaj kulturo. Kutime mi skribis la prelegon en Esperanto; sekve ĝin anticipe trarigardis iu el miaj interpretantoj, plej ofte s-ro Morizo Ga aŭ la juna Aibara. Sed malofte ili tradukis – kiel postulus lojaleco al vero – laŭvorte. Ili emis fari aldonojn kaj plibeligi mian priskribon pri Finnlando kaj ĝiaj naturo, popolo kaj kulturaj okupoj kaj atingoj, ne malofte kun tiom da belaj epitetoj, ke jen kaj jen eĉ mi mem fariĝis dubema.

Tre bone la finnajn vivon kaj cirkonstancojn prilumis al japanaj esperantistoj *Esperanta Finnlando*, riĉe ilustrita periodaĵo, kiu estis diligente pristudata. Eble ĝuste per ĝi ankaŭ s-ro Aibara konatiĝis kun finna popola poezio, kio lin instigis kolekti tutan aron da belaj popolaj kantoj kaj poemfragmentoj japanaj, kiujn li ofte alportis al mi.

Pere de s-ro Aibara mi kontaktiĝis ankaŭ kun partianoj de la japana pacmovado. S-ro Aibara laboris en la fako por eksterlandanoj de la Japania Societo por Ligo de Nacioj kaj ankaŭ mi, rekomendite de du-tri membroj de la diplomataro, membriĝis en tiu fako. La alta patrono de la Societo estis princo Tokugawa, prezidanto de la Supera Ĉambro de Japanio. Pli poste mi elektiĝis eĉ prezidanto de la fako por eksterlandanoj. Sekretario estis la konata kanada misiisto, pia kristano kaj entuziasma pacbatalanto pastro Bowles [Boŭlz]. En la Societo tiutempe membris dek kelkaj prestiĝaj diplomatoj, i.a. la belga ambasadoro

Bassompierre [Basompjér]. Fakte estis pro lia influo, ke la postenon de prezidanto oni konfidis al mi, kiam la Societo bezonis poliglota gvidanton, kiu pli bone povus reprezenti la organizaĵon en diversaj medioj. Iom post iom mi jam fariĝis konata ankaŭ kiel sciinto de la japana. En mia laboro de prezidanto mi ricevis bonegan helpon de la sekretario pastro Bowles kaj de la supre menciita juna esperantisto Aibara.

La Societo por Ligo de Nacioj havis oficejon en Tokio kaj milojn da membroj tra la lando. La afero de paco estis tre populara tiutempe. Kompreneble ankaŭ en Japanio, kiel ĉie en la mondo, estis homoj, kiuj ne fidis aŭ ne volis fidi je la ideo de paco. Same estis rilate internacian lingvon. Iuj trovis eĉ revon pri komuna tutmonda lingvo plene malreal, eĉ danĝera al naciaj kulturceladoj. Tial ili



Japania kongreso en Osaka:

La tiea movado inspiris Ramstedt al longa laŭdpoezo.

prenis por sia devo malhelpi kiel eble la klopodojn de ĝiaj advokatoj, kie ajn ili trovis okazon por tio. Unu el tiaj malamikoj de Esperanto estis i.a. la tiama guberniestro de Shizuoka. En sia gubernio li sendis policanojn interrompi esperantistajn kunvenojn kaj malpermesis la agadon de la jam fonditaj societoj. La decido de la guberniestro estis forta bato al la esperantistoj. Sed ilia fervora gvidanto, la maljuna Takahashi, venis al Tokio por viziti min kaj konsiliĝi kiel nuligi la decidon. Kune kun siaj akompanantoj li proponis, ke oni sin turnu al la ministerio pri internaj aferoj. Mi respondis, ke tio apenaŭ donus rezulton.

Diversflanke pripensinte la aferon, ni fine decidis, ke mi faros prelegvojaĝon al Shizuoka. Mi prelegos en Esperanto – tiam ni vidos, kiel sin tenos la guberniestro al tio.

Mi veturis al Shizuoka. Ĉiuj esperantistoj de la urbo estis kolektiĝintaj en la prelegejo. En la salono certe estis ankaŭ multaj aliaj, kiuj konis la situacion kaj scivolis, kio okazos. En streĉita atmosfero mi komencis la prelegon. La publiko sekvis ĝin sciavide. Oni atendis, ke en iu ajn momento aperos policianoj kaj dispelos la kunvenon. Tamen, mi povis sen ĝeno fini mian prelegon. Eble iuj estis seniluziigitaj, sed almenaŭ la esperantistoj estis ĝoje surprizitaj. Ili estis tre dankaj al mi pro la afero. Ili komprenis, ke ĉar mi apartenis al diplomataro, mi iomete ŝanĝis la opinion de ilia guberniestro pri esperantistoj. Ankaŭ sian societon ili povis poste ekfunkciigi sen ajna interveno de aŭtoritatoj.

Mi konservas plej agrablan memoron pri multaj lokoj, kiujn mi vizitis dum miaj prelegvojaĝoj. Japanoj ĝenerale



kapablas esti ĝentilaj kaj plaĉe gastamaj, sed precipe esperantistoj – supozeble pro la komuna ŝatokupo – ŝajnis aparte zorgi pri mia komforto.

Foje la japanaj esperantistoj jarkunvenis en la urbo Sendai, en la norda parto de Hondo. Kiam mi alvenis, okazis tre pompa oficiala akcepto kaj festaj aranĝoj fare de la urbo, kiuj amuzis kaj min kaj eble ankaŭ la japanajn esperantistojn.” (p. 93-95)

Okaze de tiu konveno Ramstedt vizitis monaĥejon fonditan de Date Masamune en la jaro 1609.

“Esperantistoj ege fervore volis montri al mi la monaĥejon, sed ĝia estro, tre aĝa abato, komence tute ne volis eĉ aŭdi pri vizito, kiam li eksciis, ke mi estas diplomato. Tre nervozigis lin, kiel kaj kun kia ceremonio fremda sinjoro de tia rango devus esti akceptita, ĉar li tute ne havis ian ajn sperton pri tio. Fine li tamen konsentis kaj mi estis petita por teo ĉe li.

Post akcepta ceremonio la nervozo de la abato malaperis kiel cindro en vento; mi nome tuj ekparolis pri budhismaj monaĥejoj en Mongolio kaj miaj impresoj pri ili. Ĉar mi sufiĉe kontentige scipovis la japanan kaj krome la akompanantaj esperantistoj helpis per interpreto, la konversacio fluis plej vigle. La abato estis kaj surprizita kaj mirigita pro la gasto. Aparte plaĉis al li aŭdi pri cirkonstancoj de siaj mongolaj samkredanoj.

Reveninte en la hotelon mi trovis tie du altrangulojn de la monaĥejo, flave vestitajn, kiuj transdonis al mi kakemonon faritan de la abato, kun jena skribo en ĉina ideografio:

Unu floro sola,
kvinpetala —
kiel simpla estas
la belo.

La portintoj de la kakemono rakontis, ke ilia estimata estro estis tiom emociita de la simpleco, kun kiu okazis la timita akcepta ceremonio kaj la tuta vizito, ke tuj post mia foriro li ekdesegnis la tabulon.” (p. 96-97)

Post tio Ramstedt priskribas prelegvojaĝon al Osaka, laŭ invito de la gazeto *Osaka Asahi*.

“*Osaka Asahi* vaste raportis pri mia prelego, kompreneble kun la ornamaĵoj de mia interpretisto s-ro Ga kaj pli multe laŭ la koncepto lia ol laŭ tiu de la Esperantlingva prelego, kiun mi faris!” (p. 98)

* * *

“Foje okazis en Tokio, ke diplomatoj multe cerbumis, kia viro finfine estas la reprezentanto de Finnlando. Tiun diskuton kaŭzis, ke la ministro de Ĉilio dum siaj vojaĝoj venis al Shizuoka, kaj je lia surprizo atendis lin ĉe la stacidomo pluraj centoj da entuziasmaj akceptantoj kun flagoj kaj oficiala akceptokomitato. Baldaŭ tamen montriĝis, ke ili ne venis por akcepti lin, sed anstataŭe ili atendis alvenon de la reprezentanto de Finnlando. La ĉilia ministro rakontis pri la okazaĵo al la senditoj de Brazilo kaj Peruo kaj al multaj aliaj. Oni multe divenadis, kiel mi fakte estis aranĝinta la rilatojn kun japanoj. Fine oni venis al mi kun rekta demando: “Ĉu estas kutime, ke oni tiel honorigas vin?” Mi respondis, ke mi ne estas escepto, sed ke ĉi-kaze okazis ia miskompreno flanke de la esperantistoj de Shizuoka, el kiuj laŭ mia supozo konsistis la publiko.

Parolante pri honorigoj fare de esperantistoj, mi pretere menciis, ke foje mi ricevis ege entuziasman akcepton en Hiroshima. Iu bonhava Morimoto – ĉefintendanto de junulara edukado kaj distrikta skolt-estro – aranĝis tie vere pompan akcepton, kiam mi venis al la urbo por prelegi en iu esperantista kunveno. Centoj da skoltoj staris ĉe la stacidomo. Laŭlonge de urbaj stratoj, i.a. de la larĝa Morimoto-strato, skoltoj formis honoran spaliron kun flagetoj kaj standardoj. Antaŭe rajdis flagoportantoj kaj poste la cetera honora sekvantaro. Lige kun la kunveno en Hiroshima okazis ankaŭ granda parado de skoltoj, kiun mi akceptis kune kun Morimoto. Miloj da skoltoj marŝis preter ni.

Tiaj taskoj kaj honorigoj, nekutimaj al diplomatoj, ofte falis sur min.” (p. 109)

tradukis kaj komentariis Osmo Buller (Finnlando)

Neelektitaj predikoj pri interlingviko

Plurilinguisme et communication, red. François Lo Jacomo (1954). Plejparte franc-, parte anglalingva. Paris: Société d'Études Linguistiques et Anthropologiques de France, 1986. 333 p. 24 cm. ISBN 2-85297-194-1. Prezo: 57,00 gld.

Oni rajtis atendi interlingvikan spektaklon. Ja Unesko gastigis la internacian seminarion pri plurlingveco kaj komunikado en novembro 1985. Ja UEA organizis la tuton. Ja lingvist-matematikisto François Lo Jacomo pretigis la temojn per labordokumento. Ja francuja scienca asocio poste publikigis la referaĵojn.

Sed spektakla en ĉi tiu libro estas nur la primitiveco de la interlingvikaj scioj kiujn oni povas tie trovi. Lo Jacomo prezentis proksimume 60 interesajn demandojn en sia labordokumento (ekzemple: "Se oni povas kapti televidsendojn el najbaraj landoj, ĉu tio pli emigas onin studi fremdajn lingvojn?"). Se la 24 referaĵoj respondus tiujn demandojn, la libro estus trezorego. Sed la kunvenintaj ekspertoj (kiel normalas ĉe ekspertoj) preskaŭ tute ignoris la donitajn demandojn kaj verkis pri io kio interesas ilin. Eĉ pri siaj propraj demandoj, tamen, ili plejmulte deklaris opiniojn malklarajn kaj senatestajn. Lo Jacomo (kiel normalas ĉe redaktistoj) ŝajne konsentis aperigi ĉion, inkluzive de sensencaĵoj (kaj kelkcent preseraroj). Li sandviĉis la tuton inter ampleksa resumo

kaj abstrakta gramatik-informatik-matematikfilozofia konkludeseo.

Malgraŭ ĉio, oni povas ion interesan ekscii per la libro. Jen kelkaj ekzemploj. En Maroko, Alĝerio kaj Tunizio, lernejoj uzas 60% de sia studtempo lernante la araban kaj la francan lingvojn (Moatissime, p. 81). En Japanujo jam de jarcento multas la kredantoj, ke la japana lingvo ne taŭgas por modernaj celoj; en la malfrua 19-a jarcento serioze konsideriĝis anstataŭigi ĝin per la angla (Kanaka, p. 101-103). Ĉe interkonaj semajnoj inter francujaj kaj FRG-aj junuloj, tradukado malhelpas la komunikadon per blokado de la spontaneco pli ol ĝi helpas per la klarigo de signifoj (Ladmiral, p. 156). Lingvoj plej certe malaperas kiam ilin ne plu uzas la elitoj (Duc Goninaz, p. 178). Lingvaj kostoj konsistigas proksimume 0,6% de la buĝeto de la Eŭropaj Komunumoj (Moon, p. 196-197). Francujaj surduloj ĝenerale rifuzas adopti la usonan manlingvon pro ĝia fremdeco, simile kiel malsurduloj rifuzas adopti fremdan buŝlingvon (Neve, p. 270). Se oni fone-migus la ortografion de la franca lingvo, ĝi iĝus pli malfacile traktebla per komputiloj (Companys p. 293).

Ĉefe mirigas, tamen, la preteco de eminentuloj faktŝajni nurajn ideojn. Bonvolu pruvi, Despiney, ke interŝtataj organizoj "ne povas konsideri oficialigi la lingvojn de ĉiuj ŝtatmembroj" (p. 17); Tonkin, ke la esotereco de fakaj terminaroj "estas konstruita por eksterigi la laikojn" (p. 23); Moatissime, ke la Tria Mondo "sole pagas la edukajn, sociajn kaj politikajn kostojn de la universala komunikado" (p. 83-84); Azzoug, ke "la ekzisto de unika lingvo de la scienco riskas konduki... finfine al la morto

Pensado inter parentezoj

Socilingvistikaj aspektoj de la internacia lingvo – kun aparta konsidero pri la lingva diverseco en la mondo. Internacia Simpozio honore al la Centjara Jubileo de Esperanto (kontribuoj de Tanaka, Tonkin, Chen, Eguti, Frank, Kanno, Forster, Sekelj, Gotoo, Blanke, Zhang, kaj Piron). Eldonejo kaj loko neindikitaj, 1987. 205 p. 26 cm. Fotoj. Japanlingva (p. 1-102) kaj Esperanta (p. 103-205). Prezo: 27,00 gld.

Ĉi tiuj aktoj de simpozio, kiu okazis en Tokio inter la 5-a kaj la 7-a de aŭgusto 1987 sub la aŭspicio de la Japana Ministrejo pri Edukado, la Japana Nacia Unesko-Komisiono, la Japana Federacio de Unesko-Asocioj, kaj la ĵurnalo Asahi Simbun, reprezentas la kunan provon de la organizintoj – kiuj en ĉi tiu eldonaĵo nomiĝas "Universala Esperanto-Asocio (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Monda Lingvoproblemo)" kaj "Japana Esperanto-Instituto (Japana Komisiono por Centjara Jubileo de Esperanto)" – disponigi al la movado kaj

la japana publiko la enhavon de unu el la gravaj dialogoj en la lastatempa klerula okupiĝado pri Esperanto.

La ĝenro estas iom problemkonscia kompromiso inter rekte informa aŭ "varba" dokumento celanta la ekstermovadan publikon, kaj meditema "interna" teksto kiu provas diskuti kaj dementi tradiciajn hipotezojn surbaze de antaŭesploro kaj aliaj elementoj de fake serioza intelekta laboro. Kiel tia, la dokumento estas sufiĉe utila al la postpensantoj: unuflanke ĝi ege instigas la pensadon, kaj aliflanke ĝi ilustras la kutimajn konversaciojn kun skeptikaj eksteruloj je alta kaj malnaiva nivelo. Tamen, kiel mia komento pri la ĝenro celas indiki, ekzistas iu fundamenta problemo, kiun ĉi tiaj dokumentoj – kaj la fontaj simpozioj mem – simptomas kaj ne povas solvi.

Al nia kulturo ĝis nun mankas institucia bazo por memfida kaj intelekte serioza studa laboro direktita al la naturo de la lingvo kaj ĝia socia medio. La movadaj institucioj baziĝas sur limigitaj kotizoj kaj similaj enspezetoj, kaj ili maksimume povas parenteze subvencii la intelektan laboron – kion indikas la parentezaj "(CED)" aŭ "(Komisiono)" cititaj supre. Ankaŭ ni intelektaj laborantoj kvazaŭ nur parenteze kaj subvencie dediĉas parton de ni al la necesa biblioteka fosado, la antaŭpensado k.s. Oni en ĉi tiu dokumento vidas, interalie, signojn de la

de la pensado” (p.222); Masmoudi, ke “la aktuala muzika notacio . . . permesas skribi ĉiujn naciajn aŭ regionajn muzikojn kun iliaj propraj stiloj” (p.252); Hagege, ke “lingvo ne destiniĝas internaciigi, se oni pridubas ĝin en ĝia propra lando” (p.262); Khubchandani, ke persatelita komunikado “nepre riĉigos la vivon kaj la spertojn de la amasoj per tuta nova dimensio kaj ŝanĝos ilin al alispecaj homaj estaĵoj” (p.277).

Krome, la logiko de iuj verkintoj grave paneis. Lo Jacomo asertis ke “la ekzisto de pluraj lingvoj en sama teritorio do signifas mankon de komunikado” (p.42), sed tiu konkludo ne validas se homoj sufiĉe plurlingvas aŭ disponas tradukajn servojn. Calvet nelogike skribis ke “ĉiu plivastiĝo de lingvo povas okazi nur koste de iu(j) alia(j) lingvo(j)” (p.119); li ŝajne forgesis ke homoj povas lerni kromajn lingvojn kaj per ili pli komuniki ol antaŭe. Peeters arbitre anoncis ke “ĉiu deklaro . . . ke Eŭropo devas konservi sian lingvan diversecon . . . estas sensignifa se ĝin ne akompanas konkreta modelo por administri tiun diversecon per strikta egaleco” (p.129). Garvin postulis ke antaŭ ol oficialigi kromajn lingvojn oni “konsideru ĉiujn efikojn de tia decido” (p.189); li ne klarigas kiel tio eĉ principe eblus. Frank proponas novan tutmondan lingvan sistemon, skizas tri avantaĝojn ĝiajn kaj konkludas ke ĝi “evidente... estas la plej bona *provizora* solvo” (p.246), kvankam neniu listo de konsekvencoj sufiĉas por montri ke iu solvo plej bonas el ĉiuj eblaj solvoj. La vorto “evidente” ofte misuzitas ĉi-libre.

Se vi opinias ke la interlingviko estas preciza scienca fako en kiu homaj kaj komputilaj cerbegoj sinergias pruvojn pri la optimumaj solvoj al kompleksaj lingvaj problemoj, nepre aĉetu la libron. Kaj, se vi estas sciencema kaj ankoraŭ ne elektis vian vivkarieron, nepre konsideru la interlingvikon. Ĝi bezonas vin!

Jonathan Pool (Usono)

aktuala baraktado, el kiu venos solvo. Unuflanke, oni ŝanĝis sian tonon, kaj la nuna kvieteco pli ebligas, ke nia esperantologio ekpenetru la mediojn de la kutimaj universitataj sistemoj kaj ekpartoprenu la rimedojn de la naciaj kulturaj kaj edukaj sistemoj. Aliflanke, pli junaj lingvistoj kiel Hitosi Gotoo jam heroe kreas, sub la ankoraŭ pioniraj kaj libertempaj kondiĉoj de nia laborado, solidan bazon por la posta etapo. Tiel, kiam la esperantologio ja eniros la seriozan studan mondon, estos preta nia “kritiko” de la tradicia lingvoteorio, kiu ĝis nun malhelpis ke la normalaj kleruloj rekte kaj sen patologiaj reagoj aliru la fenomenon Esperanto. Tio kompreneble ne sufiĉas: necesas, ke la movadanoj sciu kaj povu uzi tiun nian komune konstruitan kritikon. Ankoraŭ pli bone estus, se ordinara movadanoj partoprenus la verkadon de nia komuna kritiko, se ili kritikus la oficialajn intelektajn laborantojn de nia komunumo, ktp.

Pro tiuj kaj aliaj kialoj, mi forte rekomendas la legon de ĉi tiu libro, kaj ŝatus kapti la okazon por danki la organizintojn pro siatempa invito partopreni la simpozion. Tiu aŭgusto estis riĉa monato, kaj anstataŭ Tokio mi simpoziis en Delhio (kie mi ja prelegis pri Esperanto); sed mi nun vidas, kiel vastan kaj interesan sperton mi perdis!

Probal Daşgupto (Bharato)


Trans land- kaj dozo-limoj

Ĉernobil skuis la mondon. Kompilis kaj eldonis Esperanto-Disvastiga Studgrupo, Tokio, 1987. 92 p. 21 cm. Ilus. Prezo: 10,50 gld.

Nova Esperanto-grupo en Japanio, lerninte la lingvon, volis ĝin ekuzi por pritrakti aferon mondgravan. Sciigante, ke radioaktivado devena de Ĉernobil eĉ atingis Japanion, ili maltrankviliĝis pri la sorto de la eŭropanoj, kaj dissendis al siaj tieaj kontaktuloj leteron petantan raportojn kaj reagojn: “Ni esperantistoj, klopodantaj transiri landlimojn per komuna lingvo, ne faru nenion kontraŭ la atomcentrala akcidento, kiu tute sensencigis landlimojn.”

El la respondaj leteroj kaj raportoj evidentiĝas, kiom konfuze malakorde la aŭtoritatoj de diversaj landoj informis siajn popolojn pri la porsane danĝera radioaktivado.

Ekzemple, en urbo najbara de Strasburgo, tuj trans la germana landlimo, la loĝantoj ricevis konsilojn boni lavi legomojn, eviti freŝan lakton, kaj prefere ne lasi infanojn ludi ekstere. Sed en Strasburgo mem, situa en Francio, oni aŭdis nur aserton, ke nenio grava okazis. Per kia miraklo, demandas la korespondanto, la radioaktiveco



“La plej katastrofa akcidento en la mondo.”

estis haltigita ĝuste ĉe la landlimo? Eĉ ene de FR Germanio malkongruis la informoj: la deklaritaj “tolereblaj” dozo-limoj por lakto malsamis ĝis 250-oblo.

Kontraste al la ĝenerala maltrankvilo en la okcidentaj landoj, la korespondantoj en Sovetio, kie okazis la akcidento, fervoras certigi, ke la aŭtoritatoj bone regas la situacion, dum GDR-ano eĉ interpretas la raportojn el okcidento kiel klopodon kalumnii Sovetion por logi la publikan atenton for de la minacoj de la atoma armado.

La japana grupo ŝajne turnis sin nur al jamaj siaj korespondantoj kaj al tiuj de aliaj japanoj. Eble tial la respondaro – 14 el la ricevitaĵoj oni redonas en la libreto – estas iom miksa: inter pluraj neformalaj personaj leteretoj estas du pli sistemecaj raportoj, kaj longeta artikolo jam aperinta en *Monato*. Sed strange ili ŝajne ne

ricevis el – aŭ eĉ ne sendis al – la skandinaviaj landoj, kvankam tiuj estis inter la plej suferantaj, ĉar rekte tien drivis la unua radioaktiva nuboj.

Kelkaj redaktaj mankoj konfuzetas la leganton: ni komence ne komprenas, ke kadroj ĉirkaŭ iuj el la leteroj indikas, ke ilin verkis perantoj japanaj; en aliaj leteroj ĝenetas komencaj aŭ finaj rimarkoj (kia “Mi partoprenis UK en 1963”) tute ne rilataj al la temo, kiujn eblus forredakti; kaj mankas liga komenta teksto, kia povus kunordigi la tre diversajn erojn. Kompanse tamen bone funkcias kiel titoloj la trafe elektitaj citaĵoj el la leteroj, kaj entute: la “krudaj voĉoj” de la raportintoj atestas klare pri la sekvoj de la eksplodo por la popoloj kaj pri ties manko kaj misinformiĝo.

Tiun raportaron sekvas en la libro ampleksa dialogo prezentita en la nomoj de Zamenhof kaj Einstein. Tamen ĝi efektive malmulte rilatas al tiuj personoj, sed estas detala sed facile legebla atakskribaĵo kontraŭ uzo

de atomenergio, kiu enhavas multajn ŝokinformojn: ekz. ke sole en Japanio ĝis nun amasiĝis duona miliono da bareloj enhavantaj poluciitajn vestojn kaj maskojn de atomcentralaj laborantoj (p. 70). Kelkloke tamen aperas ekstremaj asertoj al kiuj mankas precizeco kaj dokumentado, ekz. ke estontece mortos en Eŭropo kelkdek mil ĝis kelkcent mil homoj pro la akcidento (p. 56), aŭ ke alia akcidento en la franca retraktejo en La Hague en 1980 “preskaŭ ekstermis la homaron” (p. 78).

La teksto estas sufiĉe bele tajpita, sed ne tute sen skrib-eraroj. Pli ĝenaj estas kelkaj lingvaj dubindaĵoj en la kontribuoj de sovetianoj kaj japanoj, precipe manko de la difina artikolo. Estas bedaŭrinde, ke la redakta grupo ne prizorgis spertulan lingvan kontrolon.

Malgraŭ tiaj amatoraĵoj, la libreto estas pensiga dokumento pri temo krize grava, kaj laŭdirinde aktuala utiligo de Esperanto.

Douglas Draper (Norvegio)

Fenikso tro hasta


Sepdek-sep ŝlosiloj por la Japano Civilizacio. Umesao Tadao kaj aliaj. El la angla trad. Geoffrey Sutton. Tokio: Japano Komisiono por la Centjara Jubileo de Esperanto (Japano Esperanto-Instituto), 1987. 353 p. 18 cm. Prezo: 26,40 gld.

Relative abundas libroj en diversaj lingvoj kiuj celas prezenti la japanan “kulturon” al alilandanoj; lastatempe ekaperas libroj pritraktantaj la industrian aŭ ekonomian sukceson de tiu lando. Troveblas ankaŭ tria speco de libro, kiu pretendas oferti “ŝlosilon” por kompreni la kaŭzon de tiu sukceso, argumentante ekzemple ke la nunan ekonomian sukceson de Japanio ebligis zena budhismo, aŭ la ideologio de la samurajoj, aŭ io alia. Tiu situacio spegulas la staton de la konscio pri Japanio de la ĝenerala ne-japana publiko: unuflanke, estas bildo pri ekzotika lando, en kiu gejoj faras teceremoniojn kaj bonzoj meditas rigardante ŝtonĝardenojn, dum aliflanke estas konscio pri industria giganto kiu plenigas la mondon per siaj aŭtomobiloj, televidaparatoj kaj komputiloj, minacante la vivtenon de aliaj popoloj.

Por la titolo de ĉi tiu libro oni elektis ne la vorton *kulturo*, sed *civilizacio*. Tiu elekto estas signifoplena, ĉar temas pri libro ne nur pri tradiciaj artoj kaj unikaj ekzotikaĵoj, sed, kiel la leganto rimarkos trarigardante la titolojn de la ĉapitroj (Libertempo, Libro kaj Eldonado, La Laborista Movado, Radio kaj Televido, Sekso, . . .), pri provo montri kiel evoluis kaj kiel statas la vivo de la japanoj laŭ la vidpunktoj de la plej universalaj fakoj de la homaj socioj. Kompreneble, unusola “ŝlosilo” ne sufiĉas por kompreni tian malsimplan aferon, kia estas civilizacio, kaj d-ro Umesao kaj la aliaj kontribuintoj (japanaj etnologoj, antropologoj kaj historiistoj) donas al ni sepdek sep. Ili estas lerte aranĝitaj tiel, ke oni povas aŭ legi la libron de komenco ĝis fino, kiel laŭteman historion de Japanio, aŭ turni sin tuj al la ĉapitro kiu tiumomente interesas. La japanajn terminojn (kiuj ne tiom abundas, kiom malkuraĝigus la leganton) akompanas klarigoj, eĉ tiujn jam pritraktitajn en antaŭa ĉapitro, sed tio ne

sentiĝas ripetigema, pli kiel ĝentila “rememorigo”. Karakterizas la tutan libron atento pri la kontinueco de la japana historio, kio estas tre bonvena, ĉar tre facilas havi la impreson, ke Japanio preskaŭ en unu nokto mirakle ŝanĝiĝis de malmoderna lando de gejoj kaj ĉerizfloroj en modernan industrian potencon.

Kiel bedaŭrinde, tamen, ke en tia bonveniginda libro tiom abundas preseraroj! Mi supozas, ke neniu kontrolis la presprovaĵojn ĉar oni hastis eldoni la libron ĝis la centjara jubileo; sed ĉu ne pli bone estus iomete malfrue eldoni seneraran libron, ol haste presi libron, kiu restos dum multaj jaroj, kaj kiu havas erarojn sur preskaŭ ĉiu paĝo?



D-ro Umesao estas tre elstara etnologo, kaj la Esperantomovado povas fieri ke ĝi havas lin kiel subtenanton. Estas domaĝe, ke oni ne povis trakti lian verkon kun iom pli da zorgo. Mi kompatas la tradukinton, kiu havis malfacilan taskon traduki libron pri la japana civilizacio el la angla lingvo en Esperanton, kaj evidente bone ĝin plenumis. Mi ankaŭ kompatas la japanajn lernantojn de Esperanto, kiuj eventuale uzos ĝin kiel lernomaterialon (kian uzon mi certe ne povas rekomendi).

Mi tute konsentas kun la opinio esprimita en la postskribo, ke ĉi tiu libro “povus esti belega modelo por la realigo de la serio pri diverslandaj kulturbildoj”. Oni ankaŭ esperu, ke baldaŭ aperos senerara dua eldono, ĉar tion ĝi ja meritas.

Charles Rowe (Britio)

La redakcio bonvenigas viajn reagojn al temoj lanĉitaj en niaj paĝoj. Bv. skribi koncize kaj klare, prefere kun spacoj inter la linioj. Ni rezervas la rajton mallongigi leterojn por aperigo. Spaco malpermesas, ke ni publikigu ĉiujn — sed ĉiuj estas nepre bonvenaj!

Malserioza malpreparo

Broŝureto de Amnestio Internacia (AI) estas ja “bela ekzemplo de kunagado por kongruaj celoj”, kiun mi bone taksas, sed ni ege bedaŭru, ke tiu dissendado okazis, kaj *sen sugestoj* por plej eble fruktodone ekspluati tiun alvokon por — samtempe — nerekta informado pri Esperanto (ekzemple per budeto en komerca strato, apud stacidomo, en lernejoj, k.s.) kaj *tro malfrue* por ion serioze organizi, laŭeble kun neesperantistaj medioj, sur loka, regiona, nacia niveloj.

Kvankam tiu kampanjo estis lanĉita la 5-an de marto — laŭ belga membro de AI — mi ricevis tiun alvokon kun *Esperanto* la 28-an de oktobro; aliloke en Belgio ili ricevis ĝin nur la 10-an de novembro. Ĉar la subskriboj estu en Londono la 1-an de decembro, tio signifas, ke oni sendu ilin plej malfrue la 20-an de novembro! Restas do deko da tagoj por peti pliajn ekzemplerojn kaj organizi ion. Tio estas absolute nesperioza!

Kiu kulpas pri tiu fuŝanta malfruigo? Ĉu UEA? Ĉu AI? Ĉu ambaŭ?

Konkludo: Tia kunagado estu pli ofta, sed uzebla fenomeno, kiun oni serioze, zorgeme preparu por ke ĝi efiku.

G. Pirlot (Belgio)

Red.: Iom surprizis ankaŭ nin la malfrua livero. UEA fakte ricevis la faldfoliojn nur kelkajn tagojn antaŭ la ekspedo, kaj rekte el la hispana presejo de AI — do, ĉi-foje ni apenaŭ kulpas!

Mi informas pri la Olimpikaj Ludoj en Seulo. Dum la Olimpiado neniun venis el Esperantujo malgraŭ mia atendo. Korea Esperanto-Asocio adoptigis nian lingvon kiel helplingvon, sed ĝi tute ne estis bezonata. Por sekvontaj Olimpikoj, UEA kaj ĉiuj esperantistoj devas serioze konsideri pri la malsukceso en la Seula Olimpiado.

Lee Jung-Kee (Koreio)

Dum la kongreso en Aŭgsburgo, s-ro Symoens proponis ke la esperantistoj en la tuta mondo agu ĉe la sama kadro samtempe. Kompreneble li aludis tiujn kadrojn, kiuj bezonas internacian komunikadon.

Tial mi volas proponi ke nia nuna kadro estu la Olimpiko en Barcelono en la jaro 1992.

Se en ĉiuj landoj la esperantistoj serĉos la partoprenontojn en tiu Olimpiko kaj instruos Esperanton al ili (en Hispanio ankaŭ al la organizantoj), tiam la hispana Olimpiko povos doni pli grandan signifon al la jaro 1992, kiam inter la landoj de la Eŭropa Ekonomia Unuiĝo forfalos la ekonomiaj limoj kaj inter ili ne plu necesos pasportoj.

Ke la unua kaj la lasta tagoj de la Barcelona Olimpiko estu ankoraŭ pli profunde ĝojigaj, per pli klara interkompreniĝo kaj intermiksiĝo de atletoj parolantaj Esperanton.

May Bijleveld (Brazilo)

Por Akademia komunikemo

Mi tute konsentas kun s-ro Aldo de' Giorgi pri tio, ke nia Akademio “tro malmulte, preskaŭ neniel, diskonigas sian agadon, siajn laboron kaj diskutojn”. Almenaŭ mi en ĉi tiu fora Brazilo preskaŭ nenion scias pri ĝi. Mi kutime legas la revuojn *Esperanto*, *Fonto* kaj *Monato*, sed nur sporade renkontis sur ties paĝoj ion pri kaj el nia Akademio. Mi opinias, ke ĝi devus periode diskonigi pere de nia tutmonda gazetaro siajn diskutojn kaj decidojn.

G. R. Corrêa (Brazilo)

Red.: Nun eblas aboni La letero de l' Akademio (40 gld. jare, pere de UEA), sed tio kompreneble ne sufiĉas por atingi la tutan movadon!

Ke ne nur Radio Vatikano . . .

Al mi ŝajnas tre grave, ke esperantistoj el la tuta mondo skribu al Papo Giovanni Paolo II por ke li dum la venonta Pasko diru bondezirojn ankaŭ Esperante. Eble tiam li faros tion kion strange li neniam

volis fari. Mi estas katolika, sed mi tre indignas pro tio.

Li estas pola kaj scipovas Esperanton. Li en Krakovo eĉ celebris meson Esperante, ĉar Papo Paolo II permesis ĝin. Ankaŭ mi skribis al li pri tio, sed li ne aŭskultis min. Eble li aŭskultos la legantojn de *Esperanto*.

Vittoria Spina (Italio)

Komitatanoj centron!

En la lastaj numeroj de la revuo mi legis kelkajn rimarkojn pri la Komitato kaj komitatanoj, je kiuj mi sentas la devon reagi (se ne pro io alia, almenaŭ por defendi la flagon).

Estas vero ke granda parto de la komitatanoj estas malaktivaj, estas vero ke granda parto de la komitatanoj estas neinformitaj, estas vero ke granda parto de la komitatanoj estas stultetaj, kaj tamen . . .

Kaj tamen tio ne estas sufiĉa preteksto por “likvidi” la Komitaton, kiel (eble erare) mi komprenis el kelkaj esprimoj kaj el kelkaj praktikaj paŝoj jam faritaj.

Mi estas absolute por skurgado de la komitatanoj kaj de la landaj asocioj, kiuj nomumas ilin sen granda atento. Mi estas absolute por insultado de la komitatanoj, kiuj forgesas siajn devojn kaj dormetas dum la jaro. Samtempe mi estas kontraŭ ĉio, kio prenas decido-povon de la Komitato kaj donas ĝin al la “burokratiuloj”, al la “aparatuoj”. Tio estas ĝenerale tre danĝera, kaj kvankam la nunaj profesiaj esperantistoj pri kiuj disponas UEA estas la plej bonaj en la mondo, nenio garantias ke tio veros ankaŭ en la estonteco, dum elektata organo estas ĉiam ŝanĝebla, kaj iugrade respondecas al la elektintoj.

Renato Corsetti (Italio)

Red.: Senkonsidere pri nia boneco, ĉiuj CO-anoj ŝatus havi funkciantan, decidopovan Komitaton, kun kiel eble plej centra loko en la funkciado de UEA — ekzemple je la landa nivelo kaj en diversaj gvidkomisionoj (vidu p. 121-22 en la julia numero).

Foliume

● **Ilitis:** Dudekjara fariĝis la konata germana E-eldonejo, entrepreno de esperantologo Reinhard Haupenthal, kies unua titolo en 1968 estis la fama satiraĵo de Kangurao, *Kiel malvenkigi Esperanton?* Al la historie gravaj represoj kiuj fundamentas la eldonejon (ĉu nur hazarde, ke la nomo anagramas je “is-literatur”?) aldoniĝis esperantologiaj studoj kaj originalaj verkoj, interalie la debatigaj sed brilaj romanoj de Karolo Piĉ. Dudekjariĝa festlibro survojas presejen.

● **Opus nigrum:** Nur pro manko de ekzempleroj ni ankoraŭ ne “foliumis” tiun ĉi revuon, kiu aperas jam de du jaroj en Budapeŝto sub la redakto de 23-jara István Ertl (samtempe redaktoro de *Internacia pedagogia revuo*). La malŝika ekstero kaŝas viglan enhavon. Ekzemple, n-ro 4/1987 konsistas sole el hungara traduko (de Ertl mem) de *La infana raso*

de Auld; n-ro 1/1988 enhavas la planan eseon de Fjodorov “Survoje”, kies resumon ni publikigis en *Esperanto* 1988/n-ro 7-8; kaj n-ro 2/1988 gamas de raporto el israela kibuco de esperantista paro ĝis konsideroj pri el-esperanta tradukado de W. A. Verloren van Themaat. Aperintaj numeroj haveblas kontraŭ po 3 irk de István Ertl, Kecskeméti u. 13, H-1053 Budapest, Hungario; jarabono kostas do 12 irk.

● **Hungario:** Fakte, mirindaĵoj ne ĉesas aperi el la lando de *Opus nigrum*. Hungara Esperanto-Asocio lastatempe faris plurajn eldonajn trafajn ĉe la landa merkato; i.a. *Kulturo de la amo* (vd. la julian-aŭgustan “Foliume”) atingis la unuan lokon sur la nefikcia furorlisto kaj jam la unuan represon. Krom por ampleksigi sian Esperantan eldonadon, HEA uzas tiun kapitalon por eldoni hungarajn tradu-

kojn el Esperanto (romanojn de István Nemere, krimromanon *Varmas en Romo* de Corrado Tavanti en traduko de István Ertl, la infanlibron de Tibor Sekelj *Kumeŭaŭa*, poezian antologion *Mi vizitis mian farmon*), kaj krome lanĉis hungarlingvan kulturen revuon *Tekintet* (Vidpunkto), kiu traktas Esperanton nur laŭokaze inter aliaj aferoj.

● **Kongresoj:** Japanoj starigis utilan precedencon, dissendante al diversaj landoj du dulingvajn raportojn pri la jubilejara 74-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj, “kiel unu informon pri Esperanto-movado en Japanio”. Krom la kongresa “protokolo” en *La revuo orienta*, kiu ja donas interesan kaj utilan bildon de la japana movado, temas pri la raporto de publika simpozio, “Kio nun estas lingvo por internaciaj interŝanĝoj?” En ĝi fakuloj komparas la meritojn de la angla, franca, japana kaj korea lingvoj apud tiuj de Esperanto. Petu ĉe Esperanto-Kaikan, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tōkyō-to, 162-Japanio.

Laste aperis...

Atoma klarigo de materialpropcecoj. Rob Vetter. Pekino: Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio, 1988 (jaro neindikita). 180 p. 26 cm. Fizika faklibro kun formuloj kaj novaj terminoj, malmultekoste preparita i.a. por studentoj en evoluaj landoj. 15,00 gld.

Ĉinaj protektataj bestoj. Ĉefred. Ĉen Ŝjaŭji. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1987. 350 p. 14 x 21 cm. Ilus. Bildoj kaj priskriboj de pli ol 150 famaj aŭ raraj bestoj de Ĉinio. 10,50 gld.

Ekumena jardeko de eklezioj en solidareco kun virinoj. Breda: Voĉoj Kristanaj 17, 1988. 20 p. 21 cm. Informilo de la Monda Konsilio de Eklezioj. 2,10 gld.

Gimnazio, La. Ŝalom Alejĥem, el la jida esperantigis L. L. Zamenhof, el Esperanto japanigis Nozima Yasutarō (dulingva eldono). Japanlingvaj komentoj de Sakamoto Syōzi. Osako: Japana Esperanta Librokooperativo, 1988. Humura monologo laŭ la eŭrop-juda tradicio, el *La Revuo* (1910). 13,95 gld.

Kapao, La, kaj aliaj rakontoj. Akutagawa Ryūnosuke (1892-1927), el la japana trad. Nozima Yasutarō. Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 1979 (represo el 1954). 94 p. 18 cm. Kvar noveloj de unuaranga verkisto, satiraj kaj distraĵoj. 9,00 gld.

Katalogo de Esperantaj poŝtmarkoj. Komp. Song Shentan. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1987. 116 p. 18 x 9 cm. Kolor-ilus. Zorga registro de ĉiuj E-poŝtmarkoj el la unuaj cent jaroj, kun filatelaj detaloj kaj plenkoloraj reproduktaj. 5,10 gld.

Krestomatio de Esperanto. Ĉefkompilinto Wei Yuanshu. Ŝanhajo: Ŝanhaja Fremdlingva Aŭdvida Eldonejo, 1988. 600 p. 20 cm. Dulingva. ISBN 7-81009-061-5. Tradukitaj kaj originalaj verkoj en Esperanto, kun ĉinaj tradukoj, detalaj Esperantaj notoj pri la aŭtoroj kaj lingvaĵo, kaj ekzercigaj demandoj. 24,00 gld.

Vojaĝo de amikeco tra eŭropa Esperantujo. Parto 1, “Oriento”. Mizuno Yoshiaki (1934-). Tokio: Esperanta Libro-Eldonejo de Tokio, 1988 (2-a reviziita eld.). 72 p. 21 cm. Fotoj. Raporto pri trimonata gastvojaĝo en 1985. 14,70 gld.

Zamenhof, oĉe esperanta. Marjorie Boulton (1924-), el la angla trad. Franc Šrampf. Maribor: Obzorja, 1987. 272 p. 21 cm. Bind. ISBN 86-377-0229-5. Slovena eldono de *Zamenhof, creator of Esperanto*. 24,00 gld.

DIVERSAĴOJ

Filatelaĵo Jugoslavio: Jubilea poŝtmarko (eldonita en 1988 okaze de la 44-a IJK). Bloko naŭopa: 16,50 gld.

Filatelaĵo Roterdamo. Kongresa koverto por la 73-a UK, kun unuataĝaj poŝtostampoj. 3,00 gld.

Kasedo: En pegazaj nuboj. Komponis kaj kantas Jan Stanislaw Skorupski, pian-akompanas Witold Czajkowski. Berlino: do, ut des, 1988. Unuhora. “Baladoj pri arto kaj amo” en la germana, pola kaj Esperanto. 25,50 gld.

Sako tola. 38 x 40 cm., kun ten-rimenoj. Blanka kun verda surpriso: tergloba simbolo kaj la vorto *Esperanto*. 6,00 gld.

Stelo tola. Diametro 78 mm. Flava kaj blua rando kun “Esperanto – lingvo internacia” kaj verda stelo sur blanka fono. 6,30 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 20% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Fake

● **Blinduloj:** Fine de 1987 la Asocio de Blinduloj en Bulgario eldonis brajlan version de *La tuta Esperanto*, de H. Seppik. Ĝiaj tri volumoj enhavas sume 328 paĝojn. Mendu ĉe BEA, P.k. 66, BG-1303 Sofia, Bulgario (prezo po 3 levoj, 3 germanaj markoj aŭ ekvivalento).

● **Kooperativoj:** Seminario en okcidenta Berlino pri la kunlaboro de okcidenteŭropaj kooperativoj estas nuligita pro la lingva problemo, atentigas unu el la berlinaj Esperanto-grupoj. Aldono de aliaj lingvoj al la itala, franca kaj angla – la kutimaj de la koncerna kooperativa unuiĝo – montriĝis neeblige multekosta por la organizantoj.

● **Informadiko:** S-ro Ian Fantom (Britio) sukcese starigis prototipon de plurlingva informsystemo por trovado de taŭgaj ekipaĵoj por handikapitoj, dum kvinmonata kontraktlaboro ĉe la Eŭropa Kosmo-Agentejo en Italio. Temas pri la unua tia solvo de la lingvoproblemo, sed laŭ la aŭtoro nur provizora: “Pli-malpli frue ili bezonos maŝintradukadon.”

● **Komputiko:** Kanadano s-ro Adriano Boldan starigis “elektronan panelon” per sia komputilo, kiun povas aliri alia komputil-uzanto laŭ la telefon-reto (Toronto 416-731-2667, x- aŭ y-modemo). Tiel oni senpage konsultas aron da informoj kaj informpetoj, eventuale sekvas “korespondan” kurson, ricevas programon, ktp. Kontaktu la aŭtoron ĉe Esperanto-Rondo de Toronto, 4 Craig Alan Court, Weston, Ont. M9P 1K4, Kanado.

● **Lingvofoiroj/Librofoiroj:** Francaj esperantistoj regule partoprenas la grandan *Expolangues*, kiu en 1988 allogis ĉ. 28 000 vizitantojn. Kultur-Centro Nantes-Esperanto organizis standon kaj debaton ĉe libro-festivalo en Nantes pri la konservo de lingvo-diverseco. Bulgara Esperantista Asocio denove havis imponan standon ĉe la Sofia librofoiro, kie ĉ. kvindek E-titolojn krome ekspoziciis la oficiala ĉina stando, kaj la vjetnama montris unu plian. Belgaj esperantistoj nun pripensas la memstaran organizon de propra lingvofoiro.


● **Monda Fonduso de Solidareco kontraŭ la Malsato:** Tiu ĉi internacia helporganizaĵo elektis uzi Esperanton apud siaj aliaj lingvoj por krei veran egalecon inter siaj anoj. La sama filozofio inspiras ĝiajn projektojn en Ruando, Ĉado, Malagasio, Francio kaj Senegal: temas pri helpo al la homoj helpi sin mem. Subtenon proponu al la adreso 15 rue Victor Duruy, F-75015 Paris, Francio.

● **Psikiatrio:** En la itallingva svisa urbo Lugano okazos, septembron 1989, la kvara mondkongreso pri la psikiatrio de la infanaĝo kaj rilataj sciencoj. Esperantistan partoprenon kunordigas d-ro Tazio Carlevaro, Via A. Di Sacco 6, CH-6500 Bellinzona, Svislando.

● **Stomatologio:** Fak-revuo por preskaŭ cent mil brazilaj dent-kuracistoj, *Odonto-noticoj*, aperigis artikoleon pri la Stomatologia Sekcio de UMEA en aŭtuno 1988.

● **Turismo:** Monda Turismo, kiu estas leĝe registrita en Belgio sed havas la centron de agado en Pollando ĉe Esperantotur, nun havas (almenaŭ formale) reprezentantojn en 42 landoj.

Alian specon de turismo proponas la Amikeca Servo de SAT: ĝi celas konigi al vojaĝantoj la fonan socion malantaŭ la muzeoj kaj panoramoj. Jam ekzistas 80-paĝa broŝuro de 112 gastigantoj en 24 landoj; mendu per poŝta ĝiro por 25 FRF de Gérard Rollin, poŝtkonto 1544 95 V, La Source (Francio), aŭ de 63 rue République, F-37530 Charge, Francio.



● **Irano:** La 30-an de oktobro, okdeko da iranaj geesperantistoj bonvenigis al Teherano d-ron Ulrich Lins, aŭtoron de *La danĝera lingvo*, en vespera kunveno ĉe la “Verda Domo”. Kvankam Lins venis unuavice pro profesiaj kialoj – la refor-tigo de akademiaj rilatoj inter FR Germanio kaj Irano post la militĉeso – li mem komentis ke la vigla mova-da akcepto emis superombri aliajn flankojn de la vizito. En sia parolado li akcentis sian subtenon al la streboj de la triamonda E-movado, inkluzive la eldonon de scienc-teknikaj libroj.

Loke

● **Mongolio:** La centra sovetia ĵurnalo *Izvestia* raportis en marto pri la vigla movado en tiu ĉi lando, pri kiu UEA malofte rekte ricevas informojn. “La dezirantoj studi Esperanton troviĝis tiom multe, ke oni devis malfermi specialajn kursojn ĉe la fremdlingva katedro de la Mongolia Ŝtata Universitato. Al la dujara stud-programo aliĝis jam ĉirkaŭ cent personoj – instruistoj, kuracistoj, inĝenieroj, laboristoj, oficistoj.”

INDEKSO 1988

Afiŝ-arto 58
Afriko 17
Akademio de Esperanto 55, 75, 76, 160, 219
Akupunkturo 2, 186
Albanio 78
Albault, A. 76
Aleksiev, N. 29
Amnestio Internacia 162, 219
Ariste, P. 19, 32
Arto 99, 139
Astronomio 18
Atai, B. 86
Ateismo 58
Auld, W. 6, 28, 36
Aunis, B. 36
Aŭstralio 78, 202
Aŭstrio 88
Aŭtomobilismo 58
Azia Centro 61
Bácskai, I. 79, 178
Bahaismo 79
Bakker, H. 17, 88, 212
Baldvinsdottir, N. 13
Barandovská, V. 128
Bartovská, M. 87
Belartaj Konkursoj de UEA 191, 199
Beletro 86
Benczik, V. 131
Benino 57
Berveling, G. 4, 73
Bibliotekoj 17, 79, 202
Bijleveld, M. 137, 219
Bjalistoko 1, 9, 15, 34, 36, 61, 81, 93, 125, 154
Blanke, D. 28, 43, 55, 76, 79
Blanke, W. 93
Blinduloj 58, 79, 203, 221
Bodard, M.-L. 86
Boldan, A. 221
Bona Espero 43
Bormann, W. 55, 93, 98
Borovečki, I. 28
Bossong, K. 206
Boulton, M. 17, 27, 67
Brazilo 17, 43, 98, 100, 126, 203
Brennan, A. 45
Bretonio 17
Britio 17, 202
Brozović, D. 178
Bulgara Esperanto-Asocio 60, 86
Bulgara Esperanto-Teatro 156
Bulgario 18, 57, 182
Buller, O. 190, 201, 213
Cappa, G. 46, 48
CED 31, 61
Centra Oficejo de UEA 46, 61, 83, 120, 141, 155, 160, 179
Chandra, R. 11
Chen Y. 28
Childs-Mee, A. 137
Cohen-Cedek, J. 76
Cool, J. F. 192
Corrêa, G. R. 219
Corsetti, R. 45, 219
Cox, J. A. 55
Ĉeĥoslovakio 98, 128, 203
Ĉilio 17
Ĉinio 2, 57, 62, 185, 203
Dai S. 46, 48, 49
Dălbokov, S. A. 60
Damjonov, G. 87
Danio 64
das Neves, J. 127
Daŝgupto, P. 30, 37, 46-49, 216
de Beaufront, L. 206

De Bruyne, L. 87
de Faria, C. 36
de' Giorgi, A. 137
de Kock, E. 30
de Lima, J. C. 55
de Miranda e Silva, I. 137
Deklaracio de Bulonjo 207
Deklaracio de Tyresö 212
Deklaro de Bjalistoko 9
DLT 41
Dobrowolski, S. 18
Dobrzynski, R. 60
Downes, W. J. 94
Draper, D. 217
Drees, W. 2, 144
Duc Goninaz, M. 211
Duličenko, A. 32
Durwael, I. 129
Ebura Bordo 57, 98, 202
Echeverría, L. 203
Edsenius, L. 128
Edukado 13, 17, 64, 98, 185
Eichholz, R. 33, 35
Ekologio 15, 79
Ekonomiko 18, 100
Ekspozicioj 57
Eldonejoj 100, 139
Ertl, I. 192
Esperantologia Konferenco 153
Estrara raporto pri la Jubilea Jaro 101
Estraro de UEA 1, 34, 61, 83
Etnismo 99, 139
Expolangues 221
Faka agado 91
Fake 18, 58, 79, 99, 203, 221
Familioj esperantistaj 45
Fantom, I. 221
Felső, G. 44, 85
Fettes, C. 36, 164
Fettes, M. 3, 13, 41, 56, 65, 82, 121, 144, 158, 189, 211
Fighieria, G. C. 34, 46, 60, 83
Fighieria-Sikorska, A. 60
Filatelo 58, 203
Filmoj: *Ĉarmaj Rodopoj* 210
En Eŭropo ie 35
Esperanto 182, 210
Flirtas verdstelaj flagoj 209
ĝenerale 18, 60, 79
Filozofio 203
Financoj 61, 84, 169, 173
Finnlando 213
Fjodorov, A. 132
Flandra Esperanto-Ligo 34
Flandroj, A. 88
Foliume 100, 139, 220
Fotografio 209
Francio 57, 98, 202
Gärtner, S. 71
FR Germanio 98
Geologio 99
Germana DR 17, 202
Giladi, J. 88
Gishron, J. 132
Golden, B. 74, 137, 188, 201
Goodheir, A. 96
Grabowski, A. 34
Grafika Centro Antverpeno (GCA) 34
Grant, J. P. 1, 31
Grattapaglia, G. 43
Greklando 57
Gunther, W. 15, 36, 93
Haase, M. 37
Haitio 19

Hall, A. 194
Handikapuloj 79
Hang Y. 62
Harabaĝiu, H. 55
Harlow, D. 85, 194
Harry, R. 27, 33, 162, 202
Haszpra, O. 42, 44
Hauptenthal, R. 4, 19, 220
Himno, La 36, 137
Hinda Unio 63
Historio de Esperanto 5, 22-26, 58, 205, 213
Hodler, H. 205-207
Hoekstra, O. 178
Hofstätter, G. 84
Homaj rajtoj 18, 161
Honora Patrona Komitato 151, 178
Honoraj membroj 178
Horst-Kolinska, M. v. d. 15
Hungario 92, 98, 182, 220
Ĥaĝiev, D. 86
IAKSTE 62, 185
Ido-skismo 206
IKU 148, 163
ILEI 18, 58, 61, 147, 207
Infana Kongreseto 36, 164
Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo 99
Informado 18, 57, 98
Instruado 13, 17, 18, 58, 62, 89, 92, 99, 128, 182, 202
Interlingvistiko 18, 99, 216
Internacia Esperanto-Kursejo (Pisanica) 51, 209
Internacia Kongresa Universitato 148
"Internacia Konsilantaro" 55, 66, 76
Internacia Ligo de Esperantistaj Foto-kino-magnetifon-amatoroj (ILEF) 209
Internacia Patrona Komitato 2
Interreligia Kunveno de Esperantistoj 36
Irano 32, 98, 182, 221
Israelo 17, 182
Italio 57, 98, 127
Janton, P. 100
Japanio 35, 98, 163, 182, 213, 218
Jubilea Jaro 1, 2, 61, 149
Jubileoj 136
Jugoslavio 17
Jung-Kee, L. 219
Junularo 16, 64, 140, 167
Kalendaro 51, 96, 187
Kalocsay, K. 24, 46
Kamaço, G. 182, 210
Kanado 14, 33
Karen, J. 89
Kasini, B. 100, 160
Katalunio 64, 140
Keetlaer, R. 93, 201
Koffi, G. 124
Kohei, E. 85
Kolombio 17
Komitato de UEA 34, 158, 186, 219
Komputiko 221
Konferencoj 31, 32, 62, 79, 98, 153, 208
Kongresoj: UK 2-a, Ĝenevo 205
UK 59-a, Hamburgo 212
UK 72-a, Varsovio 11
UK 73-a, Roterdamo 42, 50, 95, 141-160
UK 74-a, Brajtono 204
UK 75-a, Havano 61
IJK 1-a, 2-1, 3-a, 4-a, 6-a, 8-a, 12-a k.a. 211-213
IJK 44-a, Zagrebo 16, 42, 64, 166
Int. Kongreso de Blindaj E-istoj 203
Hindunia 63
Japana 220
IFEf (fervojistoj) 125
Infana Kongreseto 36, 164
Kuba 42, 44
SAT 163
Tutpacifika 202
ĝenerale 55, 87, 171, 176, 201
Konkursoj 44, 99
Kooperativa movado 91, 221
Koopmans, W. 36
Koreio 17
Koszmáluk, J. 12
Kotiztabelo 1989 183
Kritikado 67

- Kubo 42
 Kühlmann, G. 178
 Kunvenoj 36, 125, 163
 Künzli, A. 212
 Kurzens, N. 100
 Laborplano de UEA 3
 Landa agado 123
 Landnomoj 160
 Lapenna, E. 196
 Lapenna, I. 3, 21-30, 76, 93
 Larsen, P. Bo 93
 Laste aperis 38, 54, 77, 97, 118, 138, 130, 200, 220
 Latinameriko 78
 Le Magadure, S. 48
 Le Puil, J. 163
 Legio de Bona Volo (Brazilo) 58, 126
 Lernolibroj 57, 171
 Libroeldonado 65
 Librofoiroj 15, 86, 182, 221
 Libroj: *Abunde kaj redunde* 191
 Almanako de bulgaraj esperantistoj 196
 Amuza legado pri Til' Strigospegul' 73
 Anne Frank ne estas de hieraŭ 139
 Baza legolibro por komencantoj 38
 Ĉernobil skuis la mondon 217
 Ĉina antologio 71
 Dictionarium museologicum 69
 Esperanta bildvortaro 100
 Flugilhava ŝtono 37
 Jubileo 2
 Kazinski venas tro malfrue 194
 Klaĉejo 192
 Konsolo de la filozofio 72
 Kulturo de la amo 139, 220
 Kumeŭaŭa 220
 Kvarfolio 191
 Language inequality and distortion 18
 Laŭdo de l' stulteco 139
 Libro de Nejma/Libro de Adoro 70
 Mi vizitis mian farmon 220
 Murdo en Esperantujo 195
 Nederlanda antologio 96
 Plena verkaro de Zamenhof 4-8
 Pandemonio 197
 Plurlinguisme et communication 216
 Rabeno de Bacherach, La 37
 Rande de l' prudento 19
 Robaĵoj de Omar Kajjamo 32
 Rozo kaj glavo 196
 Saluton, amiko! 33
 Serĉu mian sonĝon 73
 Sepdek-sep ŝlosiloj por la Japano
 Civilizacio 218
 Serta gratulatoria in honorem
 Juan Régulo 134-136
 Socilingvistikaj aspektoj de la internacia lingvo 216
 Stafeto-libroj 103
 Sub la signo de socia muzo 196
 Sur la vojoj de la Analiza Skolo 201
 Suplemento de PIV 66
 Ŝia lasta poŝtkarto 195
 Varmas enRomo 194, 220
 Vetero kaj klimato de la mondo 71
 Libroservo de UEA 64, 154
 Likenologio 58
 Lingvistoj, lingvistiko 208
 Lingvo 132, 179
 Lingvo-uzo 74, 137, 188, 201
 Lins, U. 22, 93, 205, 221
 Litovio 98, 124
 Loke 17, 57, 78, 98, 182, 202, 221
 Long, K. 193
 Ludovikito 4, 5
 Luin, U. 29
 M'Bow, A. M. 2, 11, 18
 MacGill, S. 93, 147
 Makkink, G. F. 178
 Malagasio (Madagaskaro) 17, 79, 202
 Malinowski, R. 2, 61, 81, 125
 Manifesto de Raŭmo 212
 Martinet, A. 79
 Masterman, D. 34
 McCoy, R. 61, 179
 Megalli, T. 182
 MEM 127
 Mi (Mee), L. 47, 55, 93
 Mickle, G. 83, 93
 Middelkoop, A. J. 178
 Milojević, S. 2, 34, 61
 Minnaja, C. 30
 Monda Fonduso de Solidareco Kontraŭ la Malsato 221
 Monda Pac-Konsilio 9, 10, 56, 93, 202
 Mongolio 17
 Montevideo 24
 Monumentoj, memortabeloj k.s. 17, 57, 124, 182, 202, 203
 Movada historio vd. Historio
 Mustea, E. 19
 Nagy, I. 66
 Nawrocka, E. 71
 Nederlando 18, 57
 Nekrologoj 40, 60, 94, 144, 198
 Nemere, I. 100
 Nervi, M. 46, 70, 192
 Neŭtraleco de UEA 56
 Norvegio 18, 182
 Nov-Zelando 78
 Nurnbergo 206
 Oficiala informilo 40, 80, 140, 184, 224
 Olimpikaj Ludoj 33, 219
 Olsson, M. 14
 Oomoto 35, 126
 Organizo 83, 121, 129, 201
 Osibov, I. 30
 Paco 9-14, 64, 95, 101
 Pakistano 18, 78
 Pál, J. 91
 Papazov, D. 88
 Parolsintezo 79
 Pasporta Servo 212
 Pawlikowski, A. G. 36
 Perevalov, D. 182
 Pérez de Cuellar, J. 60
 Perevertajlo, E. S. 15
 Persone 19, 60, 79, 182, 203, 210
 Pirlot, G. 36, 219
 Planlingvoj 58, 76
 Pochanke, D. kaj V. 164
 Podmele, L. 72
 Politiko 19, 127
 Pollando 18, 78, 81, 125
 Pool, J. 216
 Premio Harabaĝiu 55
 Premio Onisaburo Deguchi 202
 Premio Zamenhof 1, 31
 Privat, E. 205, 206
 Psikiatrio 221
 Pupteatra Internacia Festo (PIF) 208
 Quirke, D. 137
 Radio 20, 79, 99, 120, 202, 203
 Ragnarsson, B. 28
 Rašić, N. 61, 179
 Reagoj 15, 36, 55, 76, 93, 137, 201
 Régulo, J. 27, 134, 136
 Religio 36, 58, 126
 Renkontiĝoj 79, 182
 Renschler, K.-H. 127
 Resende, H. A. 85
 Revuoj: *Budapeŝta informilo* 100
 Esperantisto, La 3
 Esperantisto slovaka 100
 Esperanto 206
 Etnismo 139
 Heroldo de Esperanto 60
 Juna esperantisto 205
 Juna vivo, La 211
 Kontakto 212
 Lingva 100
 Mano, La 139
 Meridianoj 139
 Opus nigrum 220
 Scienca mondo 139
 Simpozio 203
 Tamamo, La 139
 TEJO-tutmonde 212
 Tutmondaj sciencoj kaj teknikoj 100
 Ritterspach, G. 125
 Roff, D. 48, 49, 84
 Rokicki, R. 7
 Rokmuziko 203
 Röllinger, H. 203
 Rosbach, J. H. 60
 Rossetti, R. 23
 Rotario Internacia 19
 Roterdamo 46
 Rowe, C. 218
 Ruig, K. 83
 Rumanio 162
 Sadler, V. 83, 208
 Saheb-Zamani, Ĵ. S. 32, 85
 Salvesen, N. 34, 59, 65, 189
 Sanfranciska kursaro 202
 Santos, C. A. 137
 Schnell, R. 127
 Scienca apliko 186
 Scienca eldonado 44, 85
 Sebert, H. 206
 Seguru, V. 165
 Sekelj, T. 1, 29, 198
 Seminarioj 35, 64, 122, 126, 128, 216, 221
 Septier, L. 73
 Silfer, G. 131
 Simeonov, D. 210
 Skorupski, J. S. 15
 Sośniecki, J. 55
 Sovetunio 13, 32, 34, 78, 165, 182, 217
 Spina, V. 219
 Stomatologio 221
 Strategia Plano de UEA 168
 Strategio 130
 Sumber, I. 86
 Supersignoj 98
 Svane, E. 56
 Svazilando 18
 Svedio 18, 78, 128
 Svensson, G. 46
 Szabó, I. 100
 Szabó-Felső, F. 34, 126, 212
 Szerdahelyi, I. 92
 Ŝako 203
 Šiger U. 132
 Ŝulco, R. 201
 Tajlando 79
 Tanzanio 78, 202
 Teatro kaj pupteatro 44
 TEJO 16, 61, 64, 166-167, 201, 211
 Telekomunikiloj 203
 Televido 57, 62, 98
 Terminologio 35, 93, 99
 Tišljär, Z. 19, 208
 Togolando 123, 202
 Tonkin, H. 1, 9, 21, 31, 34, 61, 125, 152, 166, 210, 212
 Tradukado 41, 57, 66
 Turismo 17, 57, 58, 87, 98, 99, 165, 182, 202, 221
 Tvarožek, E. V. 36
 Ueyama M. 94
 Ukrainio 100
 Umeda, Y. 61, 63, 202
 UN 3, 31, 43, 60, 203
 Unesko 1, 3, 18, 150
 Ungar, K. 199
 UNICEF 31-32
 UNIKO 131, 132
 Usakiewicz, W. 196
 Usono 79, 98, 202
 Ŭsinsk, E. J. 84
 Vajda, I. 35
 Venezuelo 203
 Verkistoj 19
 Verloren van Themaat, W. A. 8, 58
 Virina agado 128
 Vjetnamio 182, 203
 Waringhien, G. 4, 27, 32
 Wei, Y. 38
 Wells, J. 29, 69, 142, 182
 Wermelinger, D. A. 186
 Witkam, A. P. M. 41
 Yukiko, I. 30, 60
 Zagrebo 208
 Zagvazdin, A. 197
 Zairio 79
 Zaleski-Zamenhof, L. 2, 27
 Zalmanoviĉi, S. 55
 Zamenhof, L. 4, 17, 76, 81, 124, 154, 207
 Zeiler, F. 76
 Ziegler, S. 76, 93

Anoncetoj

Ukraina Esperanto-klubo "Arbara kanto" ellaboris E-simbolon de "verda koboldo", bazitan sur la kvinpinta stelo kaj la jubilea simbolo. Profesiaj grafikistoj-klubanoj pretas desegni bildojn, bildrakontetojn, emblemojn, kartojn ktp. Kontakto ilin ĉe a/k 26, SU-263018 Luck-18, Ukraina SSR, Sovetunio.

La ĝenerala sekretario de TEJO proponas sekretarian TEJO-laborlokon ĉe si hejme, sen salajro sed kontraŭ senpagaj manĝado kaj loĝado. Dietrich Weidmann, Pf. 639, CH-8201 Schaffhausen, Svisio.

Geonkloj Esperantistaj, la koresponda servo kiu ligas gejunulojn kun pli aĝaj spertaj esperantistoj, urĝe bezonas donacojn. Pro transpagoj al UEA-konto onkl-f sincere antaŭdankas la administranto, s-ro W. Simcock.

Estimata Lentaigne, karaj francaj, belgaj samideanoj, **Wang Xigen** neniam forgesos vian helpemon por kuraĝigi la junulon partopreni en la Varsovia UK. Koran dankon! Anhui, Shitai, Renshiju, Ĉinio.

La Esperanto-sekcio de Tian Ma Turisma Servo deziras rilati amike kun eksterlando. Wang Shaobo, Tian Ma Luxingshe, Shaoyang Shi, Hunan Sheng, Ĉinio.

Estas ŝtelita la ŝarĝaŭtomobileto de Hungara Esperanto-Asocio. En la veturilo troviĝis granda kvanto de la ĝisnunaj numeroj de la periodaĵo *Fokuso* kaj ankaŭ multaj manuskriptoj. Tial ĝia redakcio povos disendi la petitajn provekzemplerajn nur post kelkaj monatoj, kiam estos presita (en pli alta kvanto ol kutime) la numero 88/4. La malagrabla incidento bedaŭrinde iom prokrastas la aperon de la sekvaj numeroj, pro kio la redakcio petas la komprenemon de la legantoj.

Kopiojn de korespondaĵoj kun Tibor Sekelj petu kontraŭ 4 internaciaj respondkuponoj de s-ro d-ro W.A. Verloren van Themaat, Volkerak-

straat 38^I, 1078 XT Amsterdam, Nederlando.

La adreso de UEA en Novjorko de nun estas: Universala Esperanto-Asocio, 777 United Nations Plaza, Suite 1, New York, NY 10017, Usono.

Kased-aparatojn tre bezonas Esperanto-kluboj en Togolando. Se vi havas aparaton uzeblan, sed ne plu uzotan, volonte ĝin ricevos: UTE, ĉe Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Lomé, Togolando.

Adressaĝo: Mi informas al UEA kaj al ĉiuj miaj korespondantoj el la tuta mondo, ke mi havas novan poŝtkeston. S-ro Alphonse Diatta, Dakar Esperanto-Klubo, B.P. 21231, Dakar-Ponty, Dakar, Senegalio.

Apenyowou Koffi, s/c Pedessi, B.P. 340 CFT, Lomé, Togolando, deziras korespondi tutmonde.

13-jara portugala esperantisto serĉas junajn korespondantojn el la tuta mondo (ekde 10- ĝis 16-jaraj) por

interŝanĝo de poŝtmarkoj, bildkartoj ktp. Frederico Neves, Av. Manuel da Maria, 48, 5^o-Dto, P-1000 Lisboa, Portugalio.

Esperanto-societo fondiĝis en la urbo Cali (Kolombio) dum la pasinta aŭgusto. Se vi volas kontakti kun ni, bv. skribi al la urba delegito (Libardo Mejía, Apartado Aéreo 3525, Cali, Kolombio). Ni interesiĝas pri la disvolviĝo de la movado en la tria mondo.

Nica literatura revuo. Se vi serĉas mankanta(j)n numero(j)n, mendu ilin ĉe ni (prezo: po 3,- DM): Artur E. Iltis, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt.

16-jara fraŭlo volas korespondi kun la tuta mondo, pri turismo, historio. Adreso: Radosław Król, ul. Grunwaldzka 4 - 27, 63-101 Śrem, Polando.

Aŭstralia somerlernejo. Ĉiunivela loĝeja somerlernejo, 9-a ĝis 20-a de januaro 1989. Partoprenontoj skribu tuj al Office of Continuing Education, University of Adelaide, Box 498 G.P.O., Adelaide 5001, Aŭstralio. Ankaŭ interesus nin aŭdi de spertaj instruistoj vojaĝontaj en Aŭstralio dum estontaj januaroj.

Oficiala Informilo

NOVA DUMVIVA MEMBRO
Nederlando: G. van Gijn.

SOCIETO ZAMENHOF 1988
Nederlando: M. van Bentum-v.d. Broek.
Sumo ĉi-jara 160.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA
PATRONOJ (minimуме \$100): Usono: L. R. Chapman; W. H. Schulze. **SUBTENANTOJ** (minimуме \$25): Usono: D. C. Haim. **AMIKOJ** (minimуме \$10): FR Germanio: J. Giessner. Kanado: A. More.

DONACOJ 1988 (gld.)
ĝis la 5-a de novembro

FONDAĴO AFRIKO: FR Germanio: W. Heinrich 1125,60; honore al E. Weichmann 67,50. Italio: L. Feliciani 15,00; V. Spina 60,00. Japanio: anonima japano 500,00. Nederlando: Nederl. E-Asocio 100,00. Diversaj malgrandaj 7,96. Sumo ĉi-jara 9293,49.

FONDAĴO AZIO: Finnlando: M. Lahinen 40,00. Anonima donaco 314,54. Sumo ĉi-jara 1130,92.

FONDAĴO CANUTO: FR Germanio: H. Billy 38,28. Nederlando: M. Libourel 10,00; Frisa Esperantista Rondo 69,90; Nederl. E-Asocio 100,00. Sumo ĉi-jara 1302,76.

ĜENERALA KASO: Britio: R. Alexander 10,62. Jugoslavio: J. Židanik 62,89. Diversaj malgrandaj 4,24. Sumo ĉi-jara 8386,13.

FONDAĴO SCIENCO KAJ TEKNIKO: Belgio: G. Pirlot 26,42. Sumo ĉi-jara 162,91.

FONDAĴO WÜSTER: Nederlando: M. Libourel 10,00. Sumo ĉi-jara 205,01.

TRIA MONDO: Nederlando: R. Moerbeek 75,00. Sumo ĉi-jara 125,00.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Solenu la 200an datrevenon de la Franca Revolucio, 22-29 julio 1989

Ankaŭ **frivole** vi spektos la mirindan revuon de la famkonata kabaredo **LATINA PARADIZO**.

* 6400 F por unupersona çambro

MONDA TURISMO Skotlandstr. 73, B-1060 BRUSELO

Ŝanco por feliĉo estas kaj restas la plej altvalora verko de Phil Bosmans. Jam pli ol 630 000 ekzempleroj estas venditaj en la nederlanda lingvo. Ĝi estas tradukita en 14 lingvoj kaj tiel atingis jam vendadon de 2 milionoj da ekzempleroj. Ĝi estas unu el la plej distribuataj libroj en la mondo. La unikan senegalan manieron de la tekstoj de Phil Bosmans vi ankaŭ trovas en ĉi tiu libro. Antaŭ ĉio kion Phil Bosmans diras kaj skribas troviĝas la vivo en sia beleco kaj riĉeco, sed ankaŭ en siaj malfacilaj kaj mallumaj momentoj. Liaj vortoj radias la amon, ili komprenas, donas ĝojon kaj transdonas la arton esti feliĉa malgraŭ ĉio. Tial **Ŝanco por feliĉo** estas ne nur helpilo en la vivo, sed ankaŭ agrabla kaj sencohava donaco. La plej altvalora verko de Phil Bosmans estas ankaŭ nun ricevebla en Esperanto.

Ŝanco por feliĉo estas eldonita de Lannoo. Mendu tuj ĉe **Eldonejo & Librejo Sonorilo, Doornstraat 22, 2610 Wilrijk, Belgio**. Telefonnumero 03.827.24.05. Vi povas mendi *tage* kaj *nokte*! Prezo sen la sendokostoj: 370 BF. La hieraŭ vi mendis — morgaŭ vi jam havos. Tiel rapide funkcias la librovendejo de Eldonejo & Librejo Sonorilo.

Mendu de la Libroservo de UEA. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

"Stafeto"-serio prezentas:

Vojaĝoj finiĝas, amantoj kuniĝas

Manjo Austin

Kiam denove edziniĝas ŝia patrino kaj ili translokiĝas al nova hejmo, malfermiĝas por Maureen nekonata mondo plene de novaj samfamilianoj. Ekiro en la profesian vivon eĉ pli malfaciligas la ŝanĝon. En rakonto, kiu sursceniĝas en irlanda ĉirkaŭaĵo, ni sekvas ŝian kreskon al adolteco.

Vojaĝoj finiĝas, amantoj kuniĝas. 128 p., 330 bfr./18,00 gld. + sendokostoj. Mendu rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ ĉe la libroservo de UEA.

Joëlle Rabu kantas en Esperanto

Aŭskultu la
"mirindan
voĉon" de
la kanada
kantistino
je ŝia disko
Passport.
Kun kantoj en
Esperanto,

Passport
Joëlle Rabu

franca kaj
angla lingvoj.
Kun plenaj
tekstoj. Kun la
jubilea kanto
verkita de
Joëlle kaj J.
Douglas Dodd,
"Esperanto".

Disko aŭ kasedo. Mendu en Eŭropo de la Libroservo de UEA: 31,20 gld. El aliaj landoj de Passport Productions, p.k. (Box) 4538, Vancouver, V6B 4A1, Canada. \$15.00 kanada mono.

Fokuso

*Kvaronjara
popularscienca
magazino*

64 paĝoj, 22 × 15,5 cm
Jarabono ĉe UEA 24 gld.

SENPAGA PROVEKZEMPLERO:
HEA-FOKUSO, Pf. 193, H-1368
Budapest, Hungario

"Stafeto"-serio prezentas:

Sub la signo de socia muzo

Antologio de poemoj kaj eseoj

William Auld kaj Stefan Maul (red.)

Pli ol 50 poetoj festis la centjarigon de Esperanto pere de tiu ĉi antologio. Siajn kreivajn esperantajn kapablojn ili uzis: rezultis antologio komprenebla, kvankam poezia, internacie.

Sub la signo de socia muzo 123 p., 425 bfr. 24 gld. + sendokostoj. Mendu rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ ĉe la libroservo de UEA.

ĈU LA HOMARO TRAVIVOS LA NUKLEAN EPOKON?

Legu **LA RESPONDON DE DIO**. Petu la senpagan libreton de Internacia Biblia Misio, 29 Plantation Road, Poole BH17 7LN, Britio.

HEROLDO DE ESPERANTO

LA PLEJ OFTA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO

De 68 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 16 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, librorecenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, krucvortenigmoj, foto-filmo
- Sciencaj suplementoj, ktp.

Jarabono: 19,00 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA
(43 guldenoj; aldonaj kostoj por aera sendo)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Calle de Juan Ramón Jiménez n-ro 28, 6º A, E-28036 Madrid 16, Hispanujo
Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska